
ISSN 0023-3692

# kontakto



## ENRIGARDO EN SEKSAJN AFEROJN

trimonata revuo de tejo
tutmonda esperantista junulara organizo

numero 63 (1979:3)

# kontakto


**REDAKTOROJ:**
Giulio Cappa, Stefan MacGill, Dario Besseghini

**KONSTANTAJ KUNLABORANTOJ:**
Csaba Finta, Jugoslavio; Miguel Gutierrez Adúriz, Marteno Ruiz Altaba, Hispanio; Michael Lennartz, Germana DR; Jan Koszmaluk, Pollando; Anna Brennan, Nederlando.

**ADRESO DE LA REDAKCIO** (por ĉiuj kontribuaĵoj krom la tentaklaĵoj): "Kontakto", Giulio Cappa, Capoluogo 45, I-11020 Charvensod (AO), Italio.

**ADRESO DE LA ADMINISTREJO**: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. (010) 36 15 39; pĉk 37 89 64 de ĝiroficejo Den Haag.


**Artikoloj, artikoletoj, leteroj al la redakcio kaj reagoj al tentakloj estas bonvenaj. Bonvolu ĉiam tajpi unuflanke de la papero kun duobla interspaco kaj larĝaj marĝenoj.**

**Ĉiu kontribuinto ricevas almenaŭ unu aŭtoran ekzempleron de la gazeto en kiu lia aŭ ŝia artikolo aperas. Novaj kontribuantoj povas ricevi donackartojn per kiuj eblas aĉeti Esperantajn librojn. "Kontakto" ja volas kontakti. Do, ne manku al ĝi!**

| | |
|---|---|
| Abono de "Kontakto" (sen membreco) por 1980...... | 16,50 gld. |
| Unuopa ekzemplero de "Kontakto"........................... | 4,00 gld. |
| MJ-K: membro de UEA/TEJO, malpli ol 26-jara, kiu ricevas Jarlibron kaj "Kontakto"n .................. | 22,00 gld. |
| MA-K: membro malpli ol 26-jara, kiu ricevas Jarlibron, "Esperanto"n kaj "Kontakto"n .................. | 55,00 gld. |
| Patrono de TEJO (sen aĝlimo), kiu ricevas "Kontakto"n kaj "Koncize"n ........................................ | 33,00 gld. |

Ekzistas kotizoj en multaj naciaj valutoj, kiuj validas ĉe pago al la kotizperanto de UEA en via lando. Tiuj perantoj akceptos viajn abonojn, aliĝojn kaj mendojn rilate al "Kontakto".

Anonctarifo: 120 gld. por tuta paĝo, 70 gld. por duona paĝo; 40 gld. por kvarona paĝo. Anoncetoj (sen kadro) po 0,25 gld. por ĉiu vorto (aŭ po 1 internacia respondkupono por 3 vortoj).

# Landaj sekcioj
DE TEJO

| | |
|---|---|
| Argentino | ArgentEJo, C.C.70, RA-2630 Firmat (Santa Fé) |
| Aŭstralio | AEJA, 4 Humphrey St., Waverley, Launceston, Tasmania 7250 |
| Aŭstrio | AEJ, Hochsteing 16, A-8010 Graz |
| Belgio | BEJA, St.-Hathebrandstraat 8, B-2510 Mortsel |
| Brazilo | BEJO, C.P. 11-1110, BR-70000 Brasília (D.F.) |
| Britio | JEB, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF |
| Bulgario | BEJ, p.k. 587, BG-1000 Sofia C |
| Ĉeĥio | JK de ĈEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha 1 |
| Ĉilio | s-ro I. Mättig C., Casilla 13828, Santiago 21 |
| Finnlando | FEJO, Kehäkatu 26 A 3, SF-70600 Kuopio 60 |
| Francio | JEFO, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris |
| Germana DR | JS de CLE, Charlottenstr. 60, DDR-1080 Berlin |
| Germanio FR | GEJ, Löwengasse 16, D-6101 Rossdorf - 1 |
| Greklando | JS de HEA, Ag. Meletiu 54, Athinai 814 |
| Hispanio | HEJS, Dos de Mayo 4, Valladolid |
| Hungario | HEJ, pf. 193, H-1368 Budapest |
| Israelo | JELI, P.O.K. 4070, IL-31 040 Haifa |
| Italio | IEJ, Cassella postale 210, I-56100 Pisa |
| Jugoslavio | JEJA, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb |
| Kanado | JEK, 2372 Haddington, Ottawa, Ont., K1H 8J4 |
| Kolombio | GNE, Apartado Aéreo 6950, Medellín |
| Koreo | Yi Yong-chol, C.P.O. 4258, Seoul-100 |
| Madagaskaro | JEOM, Vata Paositaly 3171, Antananarivo - RP. |
| Meksikio | EMJ, Apartado postal M-9310, México 1, D.F. |
| Nederlando | NEJ, Coranthijnestraat 75, 9715 RG Groningen |
| Norvegio | NJE, Lunavegen 3, N-7000 Trondheim |
| Nov-Zelando | EJANZ, Box 5032, Papanui, Christchurch |
| Pollando | PEJ, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa |
| Svedio | SEJU, Box 4009, S-122 04 Stockholm-Enskede |
| Svislando | SEJ, 18 Verger-Rond, CH-2000 Neuchâtel |
| Usono | JEN, 489 Toledo St., Aurora, CO 80011 |

ALIAJ KONTAKT-ADRESOJ

| | |
|---|---|
| Bolivio | NBEL, s-ro J. Arze, Casilla 6118, La Paz |
| Danlando | C. Lauridsen, Johannesmindevej 40, DK-9000 Ålborg |
| Japanio | JEI, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo, 162<br>Rondo Harmonia, Sakyô-Yûbinkyoku, P.O.K. 37, Sakyo-ku, Kyoto-si, Kyoto-hu, 606<br>Esperanto-Domo, Sone-Build. 502, 46-17, Yoyogi-3-tyôme, Shibuya-ku, Tôkyô-to, 151 |
| Maroko | No. 56 Rue Ait Belkhir, Inezgane, Agadir |
| Peruo | PEA, p/a G. Segami, Apartado 4948, Lima-100 |
| Pollando | PSEK, ul. Ordynacka 9, PL-00-364 Warszawa |
| Rumanio | M. Pănuş, Calea Traian 2/12, R-3900 Satu-Mare |
| Sovetunio | JS de ASE, V. Arolović, do vostrebovania, SU-121019 Moskva G-19 |
| Venezuelo | UEC, UCV, Apartado 76626, Caracas 107 |

# Nova estraro
DE TEJO

**Prezidanto:** Stefan MacGill, Bethlehemstraat 23e, 3061 GA Rotterdam, Nederlando *(kunordigo, rilatoj kun UEA)*

**Vicprezidanto:** Bruĉjo Kasini, C.P. 213, I-56100 Pisa, Italio *(financoj, membrovarbado, eduko de gvidantoj, fakaj asocioj)*

**Vicprezidanto:** Csaba Lendvay, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario *(eksteraj rilatoj)*

**Ĝenerala sekretario:** Thomas Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio *(inkl. komitata sekretario)*

**Estrarano:** Ian Jackson, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Avon, Britujo, BS23 2TQ *(eldonaĵoj, Pasporta Servo)*

**Estrarano:** Michael Lennartz, Eschenallee 45, DDR-1720 Ludwigsfelde, Germana DR *(edukado, landaj sekcioj)*

**Estrarano:** Zdravka Metz, Velika Mlaka-Nazorova 7, YU-41410 Velika Gorica, Jugoslavio *(regiona agado)*

**Estrarano:** Bob Venhuizen, Eenhoornstr. 10, 9742 TP Groningen, Nederlando *(kongresoj)*

**Estrarano:** Amri Wandel, Hakalir-str. 15, IL-64245 Tel Aviv, Israelo *(okstera varbado)*

**GVIDANTOJ DE LA KOMITATAJ KOMISIONOJ:**

**Komisiono pri Celoj:** Savas Tsiturides, Aĥarnon 360, Athinai 907, Greklando.

**Komisiono pri Regiona Agado:** Floreal Gabalda, I.U.T. Dep. Electricidad, Apartado 40347, Caracas 104, Venezuela.

**Komisiono pri Eksteraj Rilatoj:** Csaba Lendvay (adreso apude).

**Komisiono pri Varbado:** Amri Wandel (adreso supre).

**Komisiono pri Kongresa Temo:** Borje Holmberg, Arentikuja 1 B 253, SF-00390 Helsinki 39, Finnlando.

**Komisiono pri Metodiko kaj Edukado:** Imre Szabó, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

# enkonduko

Nia enrigardo en seksajn aferojn komenciĝas sur paĝo ses. Jen temo pri kiu la sinteno de junuloj kaj socio ŝanĝiĝis enorme en la lastaj jaroj. Tiom, ke oni parolas pri seksa revolucio. Tiu revolucio tamen ne estas universala. *Kontakto* ja estas relative universala, kun legantoj en ĉ. 50 landoj. Do, ricevas ĝin ankaŭ kelkaj legantoj kiuj estos maltrankviligitaj aŭ eĉ ŝokitaj pro iuj eroj, kiuj al aliaj ŝajnos tute normalaj kaj ĉiutagaj. Kion ni povas diri al tiuj, kiuj eventuale ofendiĝos? ...Ke nia daŭra silento pri ĉi tiuj temoj povas esti egale ofenda al aliaj legantoj?

Ĉiuokaze, ne englutu vian ofendiĝon, aŭ vian laŭdon, aŭ vian opinion. Ni atendas pli viglan reagon ĉi-foje ol kutime. Malpli vigla reago ol la kutima estas apenaŭ ebla.

* * *

Nia Internacia Junulara Kongreso en Austerlitz jam delonge finiĝis. Raportoj pri ĝi aperis en *Heroldo* (n-ro 11/12) kaj en *Esperanto* (sept., p. 158-9). Ni donos al ĝi do nur kelkajn paĝojn. Du el tiuj paĝoj formos foto-afiŝon. Antaŭ unu jaro ni presigis en *Kontakto* foto-afiŝon pri nia IJK en Veliko Tirnovo. Tiujn afiŝojn ni provis vendi. Niaj vendistoj ne estis ĝismorte surtretitaj de aĉetontoj. Restas al ni ankoraŭ ekzempleroj. Se manpleno el vi ankoraŭ aĉetos po unu/du, ni riskas duobligi niajn enspezojn pro ili. Konkludo: ne tre profitiga eksperimento. Kaj, kion nun faras tiu diabla TEJO-estraro? Eldonas duan foto-afiŝon! Ĉu tiuj melonkapuloj vere devas fari la saman eraron dufoje? La respondo estas ne: ni ĉiufoje trovas novajn por fari. Ni do eldonas duan afiŝon, sed kun diferenco. La estraro obstine kredas, ke vi rimarkos tiun diferencon kaj reagos pro ĝi. Ĉi tiu afiŝo estas ne nur agrabla memoraĵo por pendigo sur la necesej-pordoj de kongresintoj. Ĉi-foje ĝi estas plurlingva afiŝo kun klare legebla titolo, taŭga por ekstera varbado — ideala por elmontro en ekspozicio, stratbudo aŭ en kurso por komencantoj. Al ŝatantoj de memoraĵoj kaj pasivaj legantoj de nia gazeto ni ofertas neniujn pardonpetojn pro la fordono de du paĝoj al praktika projekto. Ekstraj ekzempleroj de la afiŝo, kaj ĉiuj jam ekzistantaj afiŝoj fariĝos haveblaj de nia nove starigita "TEJO-butiko". Detalojn vi trovos sur paĝo 5.

Aperas pri la IJK ne nur fotoj. Nia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj organizis paralele kun la kongreso seminarion pri la kongresa temo. Tio estis sendube unu el la elstaraj punktoj de la kongreso, i.a. pro la ekstermovadaj prelegantoj kaj vizitantoj kiujn ĝi allogis. Ni do sur paĝoj 16 kaj 18 prezentas citaĵojn el la prelegoj kaj studgrupaj resumoj de la seminario. Se tiuj interesos vin, vi kun kontento ekscios, ke KER eldonos finan raporton kiu entenos ĉiujn tekstojn. Vi povos poste ĝin aĉeti. Ĝia aperigo atendas nur trovon de nova KER-volontulo por finpretigi la materialon.

* * *

Ni malofte ricevas komentojn pri la stilo kaj enhavo de ĉi tiu gazeto. Sed ĉi tiuj du komentoj estas tipaj. Jim Cushing skribis: "Ne nur mi sed ankaŭ pluraj aliaj jugoslavoj volonte vidus sur la paĝoj de *Kontakto* svarmon de relative etaj artikoloj. Miaopinie tio ne nur plibonigus la legeblon de la gazeto ĝenerale, sed vaste plilarĝigus ĝian utilon al relative novaj esperantistoj." Amri Wandel, TEJO-estrarano pri varbado, skribis: "Estas nepre aldoni al *Kontakto* paĝon por komencantoj, se ni volas ke ĝi ne restu 'aristokrata' altnivela sed malfacila revuo. Tiu paĝo povas nomiĝi 'Unuaj kontaktoj' aŭ 'Unuaj paŝoj'. Ĝi enhavu simpligitajn artikolojn, gramatiko-ekzercojn kaj ludojn." Kun la unua opinio preskaŭ ĉiu povas konsenti; kun la dua ne ĉiu — sed kontraŭajn leterojn la redakcio en ĉi tiu momento ne povas trovi. Iuj timas, ke *Kontakto* fariĝus nova *La praktiko* aŭ dua *Juna amiko* kaj perdus sian idean ekskluzivecon kaj la legantojn kiujn tio allogas. Tiu idearo ja allogas. Jen citaĵo el letero de Jeanie Wilson, plurjara Patrono de TEJO: "Plaĉas al mi ke vi pritraktas gravajn temojn kiel 'malarmado', 'homaj rajtoj' kaj 'infanoj'. Kontentigas min la scio ke la junulara movado esprimas siajn opiniojn pri tiaj temoj kaj per *Kontakto* disvastigas ilin." Ĉu ni povas resti idee avangarda kaj samtempe allasi ludojn, enigmojn kaj rakontetojn por komencantoj? Reago de legantoj pri tiu debato bonvenas. Provizore, neniu paĝo por komencantoj.

Sed pri mallongaj artikoloj ni ion faros. Ni delonge faras. Rerigardu la lastajn numerojn. Jen pluraj duonpaĝaj artikoletoj kun nekomplika stilo. Ni pliuru. Antaŭ iom da jaroj aperadis en *Kontakto* paĝo kun titolo "Mozaiko". Se vi sendos al ni sufiĉajn etajn interesajn erojn, ni denove aperigos mozaikan paĝon. Por doni bonan ekzemplon, trovu sube unu mozaikeron. Krome, ni ĉiam pretas prezenti unu aŭ du paĝojn da artikoletoj pri la ĉeftemo de ĉiu gazeto. Sed unue ni devas ricevi tiujn artikoletojn!

Pri temoj de venontaj numeroj vidu paĝon 5. Notu, ke ekde nun ne nur tentaklistoj povas ricevi donaco-kuponojn. Ĉiu nova kontribuanto al *Kontakto* (ĉu per tentaklaĵo, mozaikaĵo, artikolo aŭ artikoleto kelklinia) partoprenos loterion por premioj. Ĉiu nova kontribuanto malpli ol 18-jara aŭtomate ricevos donaco-kuponojn. Jen! smg■




Ekde oktobro la tarifoj por la roterdamaj tramoj, busoj kaj subteraj trajnoj iom plialtiĝos. Ankaŭ aperos nova kategorio de bileto. Nome, por grandaj hundoj. Katoj kaj hundetoj rajtas senpage vojaĝi, se ili estas sufiĉe etaj por kuŝiĝi en korbo aŭ sub mantelo. Pli grandaj bestoj devas pagi la specialan tarifon por hundoj.

Eblas aĉeti abonon por hundo, validan por unu semajno, monato aŭ jaro. Sed la abonbileto devas montri pasportforman foton, laŭ kiu la transportata hundo estu rekonebla! LD

# Esperanto

**MONDLINGVO**

Heimsmál

Maailma keel

世界語

Lingua internazionale

Medjunarodni jezik

Bahasa Dunya

كل البلاد عموعى متجل

SAI KAI YU

**Lengua de todo el mundo**

Världsspråk

Международный язык

Weltsprache

Wereldtaal

International language

Ἡ ΔΙΕΘΝΗΣ ΓΛΩΣΣΑ

*Langue internationale*

Vila'gnyelv


Maailmankieli

Verdenssprog


MANENU JA DUNYA

Pliaj informoj pri Esperanto:
Meer informatie over Esperanto:
More information about Esperanto:
Pour plus de reseignements sur l'espéranto:
Más información acerca del Esperanto:
Weitere Informationen über Esperanto:

TEJO,
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
kaj/en/and/et/y/und:




Ĉiuj fotoj temas pri la 35a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Austerlitz, Nederlando, julio 1979)







Fotoj: I. Emmelk... acGill. Kunlaboris: G. Sutton, B. Venhuizen

Internationaal Jongeren-Kongres van TEJO (Wereld Jongeren Esperanto-Organisatie) • Congrès International de Jeunes de TEJO (Organisation Mondiale de la Jeunesse Espérantiste) • International Youth Congress of TEJO (World Organisation of Young Esperantists) • Internationaler Jugendkongress von TEJO (Weltbund der Esperanto-Jugend) • Congreso internacional de la juventud de TEJO (Organización Mundial de la Juventud esperantista) • TEJO:n Kansainvällinen Nuoruuskkongressi (Nuorten esperantistien maailmanjärjestö) • Međunarodni Omladinski Kongres TEJO (Svjetski savez esperantska omladine) • TEJO:s Internationella Ungdomskongress (De unga esperantisternas världsorganisation) • Congresso Giovanile Internazionale della TEJO (Organizzazione Internazionale della Gioventú Esperantista)

# INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO

# RIGARDO ANTAŬEN

Ne temas pri la enrigardo en seksajn aferojn, kiu okazos ekde la sekvonta paĝo. Temas pri rigardo al la sekvontaj numeroj de *Kontakto* kaj invito al vi kontribui al ili. Do, bonvolu pruvi al ni en 1980, ke nia legantaro povas esti pli reagema ol la sekvantaj asteriskoj, kiuj, cetere, nomiĝas **unu** (maldekstre), **du** (meze) kaj **tri** (dekstre).

* * *

**Kontakto 64** (1979/4) aperos ĝis la jarfino kun la temo "Eŭropo kaj la Tria Mondo". Tio estas la temo de la 23a Internacia Seminario de GEJ. Kontribuaĵoj estas jam petitaj de grupgvidantoj en tiu seminario kaj de aliaj kunlaborantoj de *Kontakto*. Verkiga cirkulero jam atingis pli ol tridek personojn. Sed verŝajne la limdato por numero 64 estos jam pasinta kiam vi legos ĉi tion. Se tamen vi brulas verki ion kaj ne pasis la 15a de novembro, tuj saltu en vian raket-propulsatan skrib-maŝinon kaj verku ion dum ĝi plenrapide transportas vin al la plej bonkvalita poŝtoficejo en via urbo. Enpoŝtigu vian kontribuaĵon nepre letere, eble ekspres, rekte al la Centra Oficejo. (Tio validas nur por ĉi tiu numero. Materialo por postaj numeroj iru al la kutima redakcia adreso).

Subtemoj pri la tria mondo estas multaj. Jen kelkaj ideoj:

**Ekonomio:** La rolo de UN, de multnaciaj entreprenoj, la nova ekonomia ordo, oleo en la Tria Mondo, la popolofluo en la urbojn, la utileco de evoluhelpo.

**Edukado:** Analfabetismo, elmigro de la edukita elito.

**Nutrado:** Rezultoj de neadekvata nutrado. Agraraj reformoj, bonigo de rikoltoj per biologia selektado.

**Politiko:** Nov-koloniismo. Revolucioj en evolulandoj — kial kaj kio poste? Rasismo. Armiloj en evolulandoj.

**Kulturo:** Subpremo de kulturoj kaj lingvoj. Kultura konflikto. Tradiciaj konceptoj pri familio kaj komunumo.

Jen pli ol sufiĉaj ideoj. Nun ni rigardu en 1980, paŭzante nur sufiĉe longe por admiri tri pliajn asteriskojn, kiuj nomiĝas **kvar** (maldekstre), **kvin** (dekstre) kaj **ses** (meze).‡

* * *

La temoj por 1980 probable aperos en la ĉi-suba vicordo. Ĉiu temo ne nepre plenigos po unu tutan numeron. Ekstertema materialo estas ĉiam bonvena!!!

**Muziko:** La rilato inter muziko kaj aliaj artformoj. Moderna muziko — biliondolara industrio kaj aganto por lingva imperiismo. Se ekzistas internacia kulturo, kian rolon havas muziko en ĝi kaj kia muziko plej influas ĝin? Kio pri la nova generacio de Esperanto-kanzonistoj? Kantoj en milito kaj historio. Popola muziko en via mondoparto. Instruo pri ludado de muzika instrumento. Bonaj kantotekstoj. Ktp. Pri ĉi tiu temo nia nova redaktoro, Dario Besseghini, preparis verkigan cirkuleron, kiun li sendis al niaj 30 kunlaborantoj. Se vi volas ricevi ekzempleron, petu ĝin de li ĉe: C.P. 210, I-56100 Pisa, Italio.

**Komputiloj:** Ĉefredaktos ĉi tiun numeron Dario Besseghini. Ni eniras novan jardekon. Komputiloj faciligas la vivon en manieroj pri kiuj ni apenaŭ konscias, sed povas minaci nian privatecon kaj liberecon kaj kaŭzi pli da senlaboreco. Maŝinoj kaj la individuo. Maŝinoj kaj civilizacio. Maŝinoj por traduki? Maŝinoj kiuj konversacias. Maŝinoj kiuj rezonas. Maŝinoj kiuj decidas. Biologia manipulado: ĉu la homaro komprenas sin sufiĉe por ŝanĝi sin? Respondeculoj pri progreso: politikistoj aŭ sciencistoj? Komputiloj en milito. Kaj en spaco. Ĉu komputiloj povas transpreni homajn taskojn sen nia scio? ...ia scio? ...ia scio? ...ia sc

**Komparo de ekonomiaj sistemoj:** Ĉefredaktos ĉi tiun temon Ĝim Kuŝino (p/a IKS, Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio). Li volas prezenti en maniero komprenebla al ne-ekonomoj komparon inter la bazaj ecoj kaj sekvoj de la ĉefaj ekonomiaj sistemoj nun ekzistantaj. Kontribuemaj homoj kontaktu Ĝim.

**Popola tradicio en la nuna mondo:** Jen la temo de la sekvonta IJK. Verku ion pri popola tradicio en via mondoparto. Kio en la moderna mondo subfosas tradicion? Kiel? Kio estas la rolo kaj valoro de popola tradicio rilate al teknologia progreso? Ĉu popola tradicio havas ankaŭ negativajn trajtojn? Kolizio inter tradicio kaj homaj rajtoj. Kion pri popola tradicio kaj turismo?

ombroj de du piedbate maldungitaj asteriskoj

asterisko maldungita de nia karatea specialisto

Ne forgesu! Kontribuaĵoj de kiu ajn speco, de kiu ajn longeco kaj pri kiu ajn temo estas bonvenaj! Novaj esperantistoj kuraĝu kontribui. Ankaŭ *Kontakto* paŝu pli juna en la novan jardekon! smg ■

‡ Pro ĉi tiu netolerebla kazo de malobeemo kaj senpermesa vagemo konstatebla ĉe niaj dungitaj asteriskoj, ekde nun neniu asterisko estos nomita. Ni rifuzos eĉ signi ĉi tiun piednoton per asterisko.

# Anoncetoj

*Tarifo: 0,25gld. por ĉiu vorto aŭ 1 irpk. por 3 vortoj.*

**Kio estas la kurzo** por la Stelo? La respondon vi trovos en la Bulteno de Universala Ligo.

**Gastigantoj en la Pasporta Servo** rajtas senpage uzi la servon dum la propra vojaĝado. Ĉu mankas gastiganto en via regiono? Proponu vin mem ĝis la 1-a de decembro ĉe: J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. La nova listo aperos en februaro 1980.

aĉetu la novan afiŝon en la nova **tejo-butiko**

*Ĉi tiu nova afiŝo helpos varbi junulojn al la Movado. Vi povas aldoni en la spaco sub la adreso de TEJO kontakt-adreson de via loka aŭ nacia organizo. Tiel, la afiŝo varbos junulojn rekte por vi. Ankaŭ la Movado paŝu pli juna en la novan jardekon!*

*Ni presis nur malgrandan kvanton de la afiŝo. Vi povas mendi ĝin de nia nova kaj ankoraŭ konstruata* **TEJO-butiko**. *Unu afiŝo kostas 500 lirojn (1,25gld. aŭ 2 internaciaj respondkuponoj). Sendokostoj 800 liroj (2,00gld. aŭ 3 irpk.) por mendoj ĝis 8000 liroj (20 gld.). Neniuj sendokostoj por pli grandaj mendoj. Adreso: TEJO-butiko, C.P. 213, I-56100 Pisa, Italio. Pagu per internaciaj respondkuponoj aŭ monbiletoj. La ĝirkonto ne estas finkonstruita. Plenaj detaloj pri la butiko sekvos, tuj kiam tio eblos.*

# Familio, seksa subpremanto

de Laŭrenco Septier, Francio

*"Pri kio timas la gepatroj?"*
*Enciklopedio pri seksa vivo*

Ideale, de buŝa ĝis genera stadioj, seksa evoluo de l'homo devus esti senrompa kaj glata procezo dank'al kiu libera individuo povus, kiam ajn, senbride kaj plenkonscie vivi libere konsentitan seksecon. Se, pro evidentaj motivoj, francaj lernejaj instancoj ne multe intervenas en "seksa edukado" — aŭ se jes, nur tre negative —, la fokuso kie retroviĝas ĉiuj tabuoj, sociaj malpermesoj kaj similaj amuzaĵoj estas la familio.

Oni scias, de post apero de Raporto Simon, ke la seksa vivo de niaj francaj nuntempuloj sin apogas sur principoj, kiujn eklezio mem ne povus malagnoski: la apero de multaj pornografiaj revuoj, filmoj, la malfermo de pletoro da *"sex-shops"*, negative, la antaŭnelonga permeso "libere" uzi kontraŭkoncipajn rimedojn kaj aborton, pozitive, ĉio tio preskaŭ nenion ŝanĝis en la meza franca menso. Nek en la meza franca sekso.

Ideoj de francaj civitanoj pri seksaj aferoj troviĝas kvazaŭ resume en mirakla libro, referaĵo de ĉiuj "progresemaj" gepatroj (la neprogresemaj ne parolas pri sekso): *Enciklopedio pri seksa vivo*, eldonita de Hachette. Tiu libro enhavas ĉion, kion bonintencaj gepatroj instruas pri sekso al sia generitaĵo. Ĝi konsistas el kvin volumoj, laŭ aĝo de la leganto, nome: 7/9, 10/13, 14/16, 17/18 jaroj kaj "plenkreskuloj". La subajn citaĵojn ni ĉerpis el "La bona sekso ilustrita", rebato de Tony Duvert kontraŭ la enciklopedio.

**Ĉu oni devas resti virgulino?** "Perdi sian virgecon por kontentigi nuran scivolemon, fari kiel paĉjo aŭ panjo, komplezeme por amiko, aŭ fari agon sendependan rilate la familian medion, ne estas, por adoleskulino, progresi en la vojo de libero kaj aŭtonomeco. Seniluziiĝoj efektive baldaŭ venos. La junulino, finfine, ekmalestimas sin, ŝi konscias, ke ŝi nur estis plezurobjekto por sia kunulo. La adoleskuloj, senkonsciaj pri sia cinikeco, ŝin foĵetos sen konsidero post ricevado de tio, kion ili volis. Fine, libero pagita per la ekscesega prezo de malestimo pri si mem kaj aliaj — kaj kiu povas esti akompanata de konsciencoriproĉoj al gepatroj, kaj de timo pri gravedeco — katenas multe pli ol la familiaj trudoj." (*Enciklopedio pri seksa vivo*, vol. 14/16 jaroj.)

Tiu antologia peco estis verkita en 1973! Ĝin kreis kvar "doktoroj" pri medicino (el kiuj du virinoj), kaj sociologino... Karaj junulinoj, ne malŝtopu la truon antaŭ geedziĝo: se tion vi farus, timu la eternan damnon!

Multaj aliaj punktoj el tiu libro estas menciindaj. La divido laŭ aĝoj respondas al la ĉiam kara proverbo: oni regas dank' al disdivido.... Tion, kion oni malpermesas al junuloj oni permesas al plenkreskuloj. Sed inverse, tio kion junuloj rajtas fari, aperas kiel neŭrozo por plenkreskuloj. Masturbado ekzemple.

Pri onanismo, la progreso estas unuavide giganta, rilate al pli malnovaj verkoj: nun, oni ne plu surdiĝas pri tio. Ne. Nek malsaniĝas pro sekva tuberkulozo (!). Ne. Eĉ, oni ne plu viktimiĝas pro Pott-malsano (!!!). Oni tute ne riskas je psikaj malsanoj: tute ne. Ĉar, nun, masturbado estas ja normala (finfine, post jarcentoj!) **periodo** de nia seksa vivo. Kaj jen la malbona flanko de tiu ŝajna "progreso": estas tute normale sin masturbi, sed nur inter iuj aĝlimoj, 12-17 laŭ la aŭtoroj... poste, masturbado iĝas **patologia.** Jen. Samseksemo? Tiu **stadio** jes ja memkompreneble estas entute normala, inter **tiu** kaj **tiu** jaro. Poste, ne plu, eĉ: "La **ekshibiciistoj** elmontras antaŭ gejunuloj siajn generajn organojn, por pruvi al si mem sian virecon. Iuj **sadistoj** provas ilin kapti (NDT: la infanojn), por kontentigi sian bezonon ilin malbone trakti. Oni ne sin risku en kompanio de nekonatoj. Oni daŭrigu sian vojon kaj konservu freŝan animon. Se la nekonato insistas, oni ne hezitu peti la helpon de preterpasantoj, aŭ de policisto. Estas aliaj seksaj malsanuloj, kiujn oni povas renkonti laŭ la hazardo de stratoj, arbaroj aŭ en publikaj lokoj, kiel kinejo." (Enciklop., sama vol.). Tiel gaje finiĝas la koncerna volumo.

Tiuj kvin libroj estas riĉe ilustritaj per fotoj kaj desegnoj, el kiuj proks. 50% temas pri gravedeco kaj beboj. La seksa plezuro ĉiam restas duaranga: la celo de amoro estas **havi infanon.** Tamen, kiel konfesas niaj aŭtoroj, foje la gepatroj deziras unu la alian sen havi bebon (fi! aĉ! honte! terure! ); eĉ tiam, la ĉefa plezuro estas pensi, ke ili iam havos bebon. Jen.

La volumoj rezervitaj al pli junaj infanoj montras **familion,** kies patro estas inĝeniero, patrino laboras pri komputoroj ("ŝi havas viran profesion, sed ŝi tamen konservis sian inecon", ktp); ili loĝas en bela domo, kun granda ĝardeno, ktp, ktp, ktp. Ili tre higiene amoras: la patro sur la patrino, ambaŭ kun tre teda mieno... Kiam ili semajnfinas en la kamparo, ili ĉiuj vivas nude: temas pri veraj "progresemuloj" (sed ili ne amoras kune: incesto ankoraŭ ne havas lokon, eĉ ĉe progresemuloj...). Kiam, alian tagon, Johano la bona fileto vidas sekson de **ekshibiciisto,** li sentas sin forte ĝenita. Komprenu tion!

Do, ni ne tediĝu pli longe per tiu Enciklopedio, sed, por resumi la enhavon de tiu avangarda Hachette-aĵo, ni diru, ke rajto amori submetiĝas al jenaj kondiĉoj:

- esti sufiĉe plenkreska kaj kapabla sin vivteni (tiel),
- prefere en geedza kadro, precipe por junulino,
- kun la celo iam havi infanon,
- la viro super la virino,
- la celo de amorado estas "elĵeto de la spermo" (tiel): nenio pri ina orgasmo, nek pri klitoro,
- kompreneble oni nur fiku kun aliseksa persono,
- la supera celo de ĉio tio estas "konstrui familion" (be jes!)

Feliĉe, restas por la junuloj... la masturbado. Kvankam, dank'al tiu libro ili komprenas, ke amoro estas certe pli agrabla: ili nur atendu la leĝan aĝon por "libere" vivi!


Cetere, post tia edukado, ili nur kapablos geedziĝi, havi infanojn kaj amori laŭ la 98%-pozicio (Raporto Simon, 1970: la paroj amoras jene: sidantaj 11%, starantaj 13%, viro sur postaĵo de l' virino — sed ne interne — 20%, virino sur viro 55%, viro sur virino 98%). *

Progreso de medicino kaj psikologio, se ĝi foje kontribuas al liberigo de l'homo, tamen kapablas fari la malon: la titolo "doktoro pri medicino" kaj la fameco de l' eldonisto ebligas, sub moderna kaj alloga vesto, glutigi malnovan pilolon al familioj kiuj (eĉ!) fieras instrui "seksan edukadon" al la gefiloj.

Okcidenta familio, "geedza familio", estas en la historia procezo sufiĉe nova tipo de socia organizo. De "grupa geedziĝo" ĝis la aktuala formo, sinsekvis multaj mezaj formoj kaj ni rajtas diri, ke tiu evoluo certe ne finiĝis. Se la familio, tia, kia ni ĝin konas, respondis al ekonomia bezono kiam ĝi aperis, estas klare, ke en nia epoko ĝi tute ne plu taŭgas en tiu rolo. Male: ĝi estas bremso rilate nian kapitalisman sistemon. La sola kongrueco ekzistas ĉe politika nivelo: niaj politikaj sistemoj sin apogas sur familia ĉelo por pravigi sian ekziston kaj certigi sian estontecon.

Kio estas familio? Strikte, ĝi konsistas el nura kerno de gepatroj kaj gefiloj. Pli ĝenerale, ĝi enhavas pli-malpli multe da aliaj personoj, kies membreco estas organizita laŭ sociaj kodoj (ĉe ni: fratoj-fratinoj, onkloj-nevoj, kuzoj-kuzinoj, ktp.). Okcidenta familio fondiĝas per geedziĝo, t.e. ligo de du membroj de du malsamaj familioj; el tio rezultas tria "strikta" familio, kaj plu nur unu laŭ la ĝenerala senco.

Socie, la familio estis la produktunuo kiam ĝi aperis; ĉiuj membroj produktis surloke, en kadro de familia



laboro. Nuntempe, pli kaj pli malmultnombraj kamparanoj daŭre funkcias laŭ tiu strikta skemo.

Sed depost pli ol jarcento, la membroj de familio disiĝas tre frue: la gepatroj ne laboras en la sama loko, la infanoj estas for de l'hejmo la tutan tagon. La procezo estas relative simpla: ju pli da industrio, des pli da proletoj; ju pli da proletoj, des malpli da familia unueco; kapitalismo bezonas "liberajn individuojn", ne ulojn ligitajn al alia sistemo, nome familio.

Sed familia ĉelo tamen utilas al burĝaro pro pluraj motivoj: gi pluvivigas la sociajn diferencojn (heredo), ĝi estas edukado-unuo, privilegia rimedo por vivigi la regantan ideologion. Alia faktoro intervenas: junularo, kiel socia kategorio, ankaŭ estas sufiĉe nova; ankaŭ ĝi estas frukto de kapitalismo. En feŭdaj socioj, eniro de l'infano en adoltan socion estis abrupta: post lernado en la familia "entrepreno", li/ŝi iĝis plenkreskulo. Same kiel ĉe la primitivaj popoloj, ritoj kaj ceremonioj faras, je difinita aĝo, de la infano adolton. Sed progreso de industrio kreis nepran bezonon instrui al infanoj de malaltaj klasoj, kiel funkciigi la maŝinojn: ne plu troviĝis sufiĉe da burĝoj por ĉion ekspluati. Iom post iom lernejoj disvolviĝis, tempo de studado plilongiĝis, kaj tiam aperis nova socia kategorio, kiun ni nomas junularo. Ĝia ĉefa karakterizo konsistas en tio, ke ĝi biologie estas plenkreska sed socie restas "infana": ĝi estas, origine, kategorio de lernantoj, kiuj daŭre lernas post sia eniro en adolta mondo. Junularo hodiaŭ estas pli vasta koncepto kaj realeco ol la ĉi-supra skemo; sed ĝi restas malfacile difinebla laŭ aĝaj kriterioj.

Tiu relative nova junularo aldonas kroman kontraŭdiron en la familio: la "infanoj" dependas fizike de la gepatroj pli longan tempon ol antaŭe. Sed ilia organizado en bandoj aŭ aliaj strukturoj faras, ke ili multe pli junaj sendependiĝas ideologie de sia familio. La afero komplikiĝas pro alia motivo: ĉar vivdaŭro estas nun pli longa ol pasinte, en la sama familio pluraj generacioj kunekzistas, se ne en la spaco, almenaŭ en la tempo.

La esencan funkcion de la familio ni povus indiki kiel: reprodukti homan specion; sed al tio ni devas aldoni korekton: familio ĉefe reproduktas sin mem. La sociaj kondiĉoj, kiuj prezidas reprodukton de nia specio ege variis en historio, ĝis la kvazaŭ entuta venko de "geedza familio" en la mondo.

Kion tio signifas konkrete?

Ke, ĝuste kiel diras nia science objektiva enciklopedio, la deviga celo de gejunuloj estas: geedziĝi, havi infanojn, fondi familion. Tie troviĝas kaj la origino kaj la fino de familio. Ekster produkto de infanoj, ĝi nun ne havas ian ajn alian rolon. Kaj la metodojn por eduki la infanojn ni jam konas! Ĉu necese aldoni, ke, se samseksemuloj nepre ne havas la rajton karesi infanojn, la gepatroj arogas al si tiun rajton — eĉ se la infano ne konsentas —, kiu ofte temas ne nur pri dolĉaj karesoj. La povo, kiun posedas la gepatroj super siaj infanoj, rekte respondas al la povo kiun ili NE posedas en sociaj aferoj; ĝi estas tiel identa, ke seksa subpremado de gejunuloj samsignifas kiel subpremo de proletoj far burĝoj: oni subpremas por eviti disiĝon de energio, por akceli produktadon kaj tiusence produktadon de infanoj.

Sed, sed, sed. Kelkaj progresoj okazis, kontraŭ la volo de antaŭaj generacioj: same kiel, iom post iom, oni lasis la gejunulojn elekti mem sian kunul(in)on — edz(in)on —, nun oni devas fari aliajn cedojn. Pli kaj pli multnombre kaj pli kaj pli frue, gejunuloj amoras kaj ĝuas (duon)liberan seksan vivon. Efektive, la punkto, kiu devus esti la bazo, la fundamento, de tiu enciklopedio, nome la **plezuro** (kaj kiun la libro traktas nur duonkaŝe...) ja estas unu el niaj plej fortaj motivoj por vivi. Nemirinde do, ke gejunuloj pli kaj pli kontestas al la gepatroj la rajton enmiksiĝi en ilian seksan vivon. Nemirinde ankaŭ, ke samseksemuloj, iom lacaj pri la bildoj, kiujn oni

* Legantoj rimarkos, ke tiuj ciferoj sumiĝas je preskaŭ 200%. La aŭtoro ne reagis al esprimiĝo de redakcia mistifikiteco. Ĉu povas esti, ke la enketintoj entuziasmas ĉi-teme ducent procente? Pli verŝajne, absolutaj estas la aluditaj 98% kaj la aliaj procentaĵoj montras disdividon interne de la restantaj 2% — ankaŭ iom mirige.

konstruas pri ili, ankaŭ postulas plenan liberecon.

Tamen, malgraŭ ĉiuj konkeroj kaj luktoj, familio restas la privilegia loko por konstrui kastritojn:
– Se la fama Edipa komplekso ekzistas en la familio – kaj necesas esti singardema rilate kaj ekziston kaj signifon de tiu konstruaĵo – eble necesus insisti pri la fakto, ke ĝi ne estas faro de l'infano, sed ja rezultato de familiaj kontraŭdiroj, de la strukturo mem. Ne spontane, la bebo deziras "murdi" la patron! Tio estus tro bela venko por ĉipaj psikologoj! Konsekvence, ni povas diri sen ia ajn troigo, ke neŭrozoj ligitaj al Edipa komplekso fontas rekte el la strukturo mem de organizo-formo konata sub la nomo "geedza familio", kiu estas neŭrozo-genera – la seksoj estas biologiaj, sed la sociaj funkcioj de seksoj estas nura konstruaĵo. Estas entute false, ke etulino estu "dolĉa, atentema, helpema", dum etulo estu "batalema, vigla", kaj aliaj kretenaĵoj. Certe, post kelkaj jaroj la roloj estas fiksitaj: al etaj filinoj oni aĉetas ludilojn, kiuj reproduktas ilojn de l' patrino (gladileto, manĝilaro ktp); ilin oni vestas per roboj, oni instruas al ili kiel iĝi "inaj". Dume, al knabeto oni aĉetas pafilojn, soldatetojn kaj ludojn kies rolo estas transformi ilin al viroj fortaj kaj viglaj. Tiu "ineco" kaj tiu "vireco" estas tiel fabrikitaj, kiel iu ajn varo. La familia ĉelo produktas belajn virinojn kaj fortajn virhomojn. Tiu konstruaĵo, tiu fabrikado, ne okazas laŭ historia hazardo, sed laŭ la reganta socia bildo: reganta ne nur politike, sed ankaŭ mense (kaj transdonita tra edukado); tio estas la plej danĝera flanko de l' familio: krei senkonscian memsubpremadon en la malfeliĉa cerbo de siaj infanoj.

Unu el la gravaj partoj de tiu subpremado troviĝas en la seksa sfero: ne tiel foras la tempo kiam oni diris al knabino, kiu unuafoje menstruis, "jen, mia kara, tio estas la malbona sorto de l' virinoj, ilia peza ŝarĝo!"; kiom da gepatroj, male, festenas la eniron de sia knabino en sekse maturan vivon per ĉampano, dum la apero de barbo ĉe l' knabo vekas entuziasmon? ...

Fakte, seksa subpremado komenciĝas multe pli frue: se la seksaj organoj, niatempe, ne plu estas "malpuraĵo", ili iĝis tiagrade "medicine higienaj", ke ilia funkcio (plezuro) foriĝis al nova skemo anatomia. Kia epoko! Oni forneas seksecon de junaj infanoj kaj malpermesas al ili ĝuadon kiun ili – malgraŭ tio – forte deziras, kaj spertas. Kiam ili ekdemandas serioze pri sekso, ili estas jam tiel bone edukitaj, ke ili ne demandas: "Je kio tio utilas? " aŭ "Kio estas amori? "; ili demandas: "De kie venas la infanoj? " Kaj al tiu demando respondas la gepatroj laŭ la sankta enciklopedio – aŭ ankoraŭ pli kretene: de brasikoj ĝis cikonioj kiuj vere tre malalte flugas, la tuta vivanta sfero ofertas aron da idiotaj legendoj –, respondas do, ke, jen, la spermatozoido tion faras, ke la ovarioj tion faras kaj reciproke ni-ne-parolu-pri-ovoloj-sed-vi-divenas-kion-mi-pensas-kaj-ĉiel-mi-dubas-ĉu-tion-oni-povus-kapti-sur-malpuraj-necesejaj-kuvoj. Jen.

Al demandoj pri plezuro oni respondas per biologia, anatomia, higiena kaj medicina ĵargono. De honto, kiu estis la kutima sinteno antaŭ nur kelkaj jardekoj, priskribo de sekso venis al same sensignifa lingvaĵo: tiu de objektiva kaj senkolora scienco. Kiel diras la "patro" en la enciklopedio: tion oni ne devas diri per slango, sed per la ĝustaj vortoj (be jes!). Ĝuo iĝas do "elĵeto de spermo". Estas ja kompreneble ke, kun tia edukado kaj ties rezultato en jam sufiĉe potenca superegoo, nur kelkaj el la viktimoj povos havi kontentigan seksan vivon. Plimulto degeneros laŭ la socia skemo, kiu estas la normo. La Seksa Ordo.

"Perversioj", jen kiel oni traktas ĉiujn formojn de seksa plezuro ekster la geedza amoro (kvankam "normala" rilato kun persono de la alia sekso ekster geedziĝo ne estas perversio: niaj medicinaj doktoroj tamen ne estas inkvizicio...). Ne nur en tiu enciklopedio; en PIV oni trovas, sub rubriko "perversio" la jenon: 2. (psi.) Devio de la seksa instinkto, kiu, repuŝata de la cenzuro, provas kontentigi sin en nenormalaj, arkaikaj formoj (samseksemo, memerotismo, sadomasoĥismo, ekshibicio, fetiĉismo ktp.)".

Estus tempo klare eldiri, ke ĉiuj agoj, kie homo trovas seksan plezuron estas nek "normalaj" nek "nenormalaj": se ili estas aŭtentike kontentigaj, se la eventuala kunul(in)o plene konsentas, kie do troviĝas la problemo? La vera neŭrozo de psikanalizo pri "regreso" kaj "arkaikaj formoj" neniel praviĝas; certe, se homo kapablas ĝui nur per si mem (ekz.) kaj ĝeniĝas pri tio, kaj se li aŭ ŝi deziras kuraciĝi, la terapio estas utila. Sed, se la malkovroj de Freud kaj Reich kaj aliaj, kiuj povus liberigi ion en ni, utilas nur por maski nian honton kaj nian timon rilate al seksaj problemoj, unuvorte se el psikanalizaj konceptoj oni nur elmontras la erarajn, tiam oni prikonsideru ties uzantojn nur kiel seksajn policistojn. Analogie: kiu ĝuas nur per aŭskulto de mezaĝa muziko, kaj ne povas elteni pop-muzikon (apenaŭ Wagner), ĉu tiu viktimo de regreso kiu kontentigas sin nur per arkaikaj formoj estas aŭ ne neŭrozulo? Kial do oni forneus nian rajton regresi ankaŭ en nian propran, individuan historion kaj nin masturbi, bugri, suĉi kiel ni volas?

Se tamen oni atentu pri la subpremata karaktero de "seksa liberigo" (se oni "liberas" NUR pri sekseco, ie estas mistifiko: kiel libere vivi en ekspluatanta socio?) – iuj landoj laŭdire estas sekse "liberaj": tamen en tiuj troviĝas proletoj. Efektive, "seksa libero" estas facile uzata de ekspluatantoj por silentigi ekspluatatojn: se ĉi tiuj ĝuas kontentigan seksan vivon, kaj do estas psike ekvilibraj, du eblecoj ekzistas. Aŭ ili konscias pri sia ekspluatateco kaj ribelas, aŭ male ili blindiĝas ankoraŭ pli.... Bedaŭrinde en kelkaj "socialistaj" landoj, ŝajnas, ke la dua solvo regas. Liberigo de seksa vivo povas esti duflanka armilo, se ĝi restas sektora. Necesas agnoski nian seksecon: ni estas ja pensantaj estaĵoj, sed ni ne sufiĉe pensas pri plezuro...

Se lastan diron mi havas por fari, ĉefe al junuloj kaj tiel nomataj "adoleskuloj", ĝi estas alvoko: amoru, fiku, prenu plezuron! Ne aŭskultu la debilajn voĉojn de seksaj malsanuloj kiuj konas nur unu formon de plezuro: subpremi tiun de aliuloj. ▪



Fotoj senditaj de la aŭtoro

# Unu el dudek




de Frans Stein,
Nederlando

Usona sciencisto Kinsey post multaj enketoj kaj studoj kalkulis ke proksimume kvin procentoj de la mondloĝantaro amas nur anojn de la sama sekso, pli granda grupo amas dum certa periodo anojn de la sama sekso kaj plej granda grupo amas nur anojn de la alia sekso. Cetere ankaŭ estas pruvite, ke ĉiu havas sentojn, kiujn oni povas nomi samseksemaj, sed ofte oni ne rekonas tiujn sentojn aŭ oni ne volas rekoni ilin.

**Kvin procentoj signifas, ke unu persono el 20 estas samseksemulo. Se vi ekzemple havas cent gekonatojn, inter ili devas laŭstatistike troviĝi kvin samseksemuloj. Sendube vi ne konas tiom, eble vi konas eĉ ne unu. Estas ja tiel, ke multaj samseksemuloj kaŝas sian seksecon, ĉar ili ne kuraĝas paroli pri tio en socio kiu primokas samseksemulojn kaj diskriminacias kontraŭ ili.**

La franca revolucio alportis al la eŭropaj ŝtatoj la koncepton pri egaleco, frateco kaj libereco. Al la rajto je libereco apartenas ankaŭ la rajto mem decidi pri la maniero laŭ kiu oni volas atingi sian feliĉon, kiun ja ĉiu esperas trovi en la vivo. Tiu feliĉo povas esti la amo al anoj de la sama sekso. Tiu amo ankoraŭ ne estas tiel vaste priparolata kiel la amo al la alia sekso. Kontraŭ samseksemo ankoraŭ ekzistas multaj antaŭjuĝoj, kiuj havis kaj havas kelkfoje terurajn sekvojn.

Post la franca revolucio multaj ŝtatoj forigis la diskriminaciajn leĝojn, sed post proksimume kvindek jaroj oni en Germanio reenkondukis leĝojn, kiuj malpermesas la samseksan amon, kaj multaj landoj tiun diskriminacion sekvis. Tiu diskriminacio ne estas senkiala. Samseksemuloj (mi ekde nun nomos ilin gejoj: de la angla *gay* = samseksemulo) ne geedziĝas kaj ne fondas familion. Ili do povas striki kaj batali por sociaj rajtoj sen samtempe kaŭzi problemojn al la familio, kaj la ŝtatestroj ne ŝatas tion, ĉar ili estas tiubaze neĉantaĝeblaj.

Post la revolucio en Sovetunio, la ŝtato lasis la gejojn liberaj. En la enciklopedio de 1930 ekzemple aperis: "...en la evoluintaj landoj la batalo por forigi ĉi tiujn hipokritajn leĝojn tute ne finiĝis. La soveta leĝo tute ne agnoskas pekojn kontraŭ la moralo". Sed en la tria eldono el 1971 estas skribite: "...samseksemo estas seksa perverseco kiu signifas nenaturan amon je personoj de la sama sekso. Ĝi ekzistas ĉe personoj de ambaŭ seksoj. La leĝoj en Sovetunio, la socialistaj landoj kaj eĉ en kelkaj burĝaj ŝtatoj enhavas punregulojn kontraŭ samseksemeco."

Post la venko de la faŝismo en Germanio en 1933 komenciĝis la persekuto kontraŭ la gejoj. Oni malpermesis la gejajn grupojn, kiuj tiam jam ekzistis, kaj en 1935 ekvalidis nova leĝo, kiu malpermesis eĉ gejajn sentojn. En 1936 fondiĝis speciala sekcio, kiu okupiĝis pri la solvo de la "problemo". La gejoj estis metitaj en la koncentrejojn Dachau, Neuengamme kaj Auschwitz, kiuj estas konataj kiel la plej severaj koncentrejoj. La gejoj estis sub la komando de "homoj kiuj scias kiel trakti malpli altajn homojn". Oni terure eksperimentis per kemiaĵoj, kastris kaj mortigis. Same kiel la aliaj kaptitoj ankaŭ gejoj havis emblemon. La judoj havis la sespintan flavan stelon, la ciganoj brunan triangulon kaj la gejoj rozkoloran triangulon. Tiu ĉi triangulo poste iĝis la internacia insigno kiun portas pluraj gejoj.

La gejoj, kiuj travivis la koncentrejan periodon, estas la solaj viktimoj de la nazioj, kiuj post la milito ne ricevis helpon kaj subtenon. Post la milito en multaj ŝtatoj fondiĝis gejaj movadoj, kiuj strebas por samrajtigo kaj kontraŭbatalas diskriminacion. Ankaŭ en Esperantujo fondiĝis movado (Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj, LSG), kiu okazigis sian unuan renkontiĝon en Londono en aŭgusto ĉi-jare. (Informoj estas haveblaj ĉe P. Danning, 44 Morley Road, Twickenham, Britio, TW1 2HF, kontraŭ unu respondkupono).

Venko kontraŭ la diskriminacio kontraŭ gejoj estis tio, ke la nuna estraro de UEA forigis malnovan decidon, kiu malpermesis ke aperu anoncoj pri gejaj aferoj en la revuo *Esperanto*.


Ofte aŭdata aserto pri gejeco estas, ke ĝi estas kontraŭnatura, sed en tiu kazo la asertanto forgesas ke ankaŭ la aliseksema amo estas kontraŭnatura. Nur estas nature, ke viro gravedigas virinon kaj tiu virino post naŭ monatoj naskas la infaneton. Ĉiu esprimo de amo kaj ŝato estas nenatura sed tio ne signifu, ke ni ne okupiĝu pri tio. Estas stulte opinii, ke la sola celo en la vivo estas naski kaj naskigi; tial oni ne povas ekskludi personojn kiuj ne kontribuas al la kresko de la mondloĝantaro.

Alia aserto estas, ke homoj gejiĝas kiam ili rilatas kun gejoj. Pro tiu aserto en multaj landoj oni enkondukis leĝojn kiuj malpermesas seksajn kontaktojn inter personoj de la sama sekso. Tiel ĉi oni volis eviti ke homoj, kiuj iam rilatis kun gejo, restu gejoj. Se oni bone pripensas ĉi tiun aserton oni devas konkludi ke ĝi estas stultega. En la ĉiutaga vivo ni daŭre rilatas kun aliseksemuloj. Pro tiuj influoj ĉiu devus esti aliseksemulo. La avantaĝo de gejaj rilatoj estas, ke oni povas kompari kaj tiel multe pli facile malkovri ĉu oni mem estas gejo. Se tio estas la kazo, oni konsciiĝas pri si mem. En la alia kazo oni ekscias, ke oni ne estas gejo. Sur tiu bazo Nederlando en 1969 forigis artikolon el la leĝo kiu malpermesis samseksajn seksrilatojn. Per tiu paŝo Nederlando fariĝis la unua lando en Okcidenta Eŭropo kiu forigis tiun diskriminacion.





La jena anonco aperis en la novembra kaj maja numeroj de la revuo *Esperanto.* Ĝi prezentas oficejan scenon, en kiu juna virino prenas fotokopion el kopimaŝino. Sed rigardu la fonon iom pli zorge. Ŝajnas, ke la stabo de ĉi tiu oficejo konsistas tute el viroj. Ili diskutas telefone, faras aranĝojn. Kio povus esti la rolo de virino en ĉi tiu vira etoso? Simple – stari dekoracie apud la fotokopiilo.

Tiel oni uzas virinon por vendi kopimaŝinon. Kaj nun vidu dekstre, kiel viro estas uzata por la sama celo.



VIRINOJ KAJ VIROJ:
Serio de Anna Brennan – PARTO SES:

# Stereotipoj



La jenajn ŝercojn mi trovis en lastatempaj numeroj de Esperantaj revuoj. Verŝajne vi ĉiuj vidis similajn:

*Kiam kuracisto esploras pacientinon, li diras al ŝi:*
*"Vi havas kapdolorojn, via stomako ne estas en ordo, vi havas hipertension ... pardonu, kiel aĝa vi estas?"*
*"Dudek naŭ", flustris la pacientino.*
*"...kaj evidentiĝas, ke manifestiĝas ankaŭ granda memorperdo."*

*La virinoj rimarkas, ke ili komencas maljuniĝi, nur kiam la aliaj homoj jam delonge ĉesis rimarki tion.*




*Tute trankvile frandu tiujn ĉokoladojn – ili estas farĉitaj je tablojdoj maldikigaj. Pli kaj pli da ili vi manĝos, pli kaj pli ili aliformigos vin en sveltulinon!*

Kulturaj kajeroj, mar.-apr. 79/2


La ĝenerala prezento de virino, precipe en humuraj rubrikoj por komencantoj, estas de etmensulino, kiu interesiĝas nur pri sia formo kaj aspekto. Sed kompreneble, virino, kiu pensas nur pri tio, ne povas dediĉi sufiĉe da atento al sia plej grava okupo: la prizorgo de viroj. Troviĝas kelkaj komentoj tiuteme en la proverbaro de Zamenhof:


**34. – Ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco. Edzin' admirata – edzo malsata.**
**38. – Virino havas haron longan kaj saĝon mallongan.**
**40. – Rol' de virino – bona mastrino. Virta virino straton ne konas.**



Mi trovis la supran anoncon en anglalingva revuo. Viro, prezentita kiel "oficeja direktoro", solene elparolas sian opinion pri la maŝino. La anonco finiĝas per la vortoj: "Petu vian sekretarion sendi la respondilon hodiaŭ". En la angla la vorto **secretary** estas neŭtrala rilate al sekso, sed pro la efektiva situacio, oni kutime komprenas ĝin signifi "sekretariino" (krom se temas pri la ĝenerala sekretario de kompanio, kiu kompreneble estas plej ofte viro). Kiam oni aŭdas la vorton **secretary**, oni emas imagi ...







Malgraŭ siaj ŝercoj pri la virino, kies ĉefa zorgo estas ŝia beleco (aŭ ĝia manko, kiam ŝi pliaĝiĝas), ŝajnas, ke viroj tamen ĝuas rigardi junajn, allogajn virinojn. Alie, kial la paĝoj de revuoj estas plenigitaj per fotoj kiel tiu maldekstre (uzita por reklami duŝon kun la jena slogano: "Pro tio, kion oni ne vidas en nia duŝo, ĝi estas la plej bona marko")?

Ankaŭ Esperanto-revuo, *Hungara vivo*, kulpas pri tio. Nu, veraj nudulinoj eble estas ankoraŭ iom avangardaj por nia Esperanto-gazetaro. Do ni devas kontentiĝi pri junulino en bankostumo, kiu reklamas aldonaĵon al malvarma trinkaĵo. Konsentite, homo en ban-kostumo estas sufiĉe taŭga maniero tion fari. Sed kial tiu homo ĉiam estas virino — eĉ en du apartaj anoncoj en la sama numero (N-ro 2, 1979)? Kie vi laste vidis nudan viron uzatan por vendi duŝon?


Verŝajne en la sama revuo, kie troviĝas bildo de virina sciencisto, kiu prezentas teknikan ekipaĵon ...





**D** por dometo,
ludil' eleganta,
por eta filino,
plezuro konstanta.




**M** por magneto.
La knabo tre miras,
ke tia ludilo
pingletojn altiras.



**G** por globetoj.
Jen estas ludiloj
malgrandaj kaj rondaj
kaj bonaj por filoj.

Jam kiel infanoj ni komencas lerni stereotipajn rolojn. Dometo estas por knabino, dum por knabo estas rekomenditaj globetoj, magneto, konstruo de neĝa viro ktp. La jenaj bildoj venis el ABC-libro *Ludiloj* eldonita de Brita Esperanto-Asocio. Tiu libro verŝajne estas sufiĉe malnova (ĝi ne estas datita). Tamen la dua foto, kiu aperis pasintjare en nacilingva anonco, montras ke la prezento de stereotipoj ne fariĝis malaktuala demando.

Sed en la ĉi-jara junia numero de *El Popola Ĉinio*, ni vidas provon eskapi de la kutimaj seksroloj per ĉi tiu bildo, kun titolo "Mi fariĝos piloto". Espereble tio estas nur la komenco! ▪






# Normaleco kaj nenormaleco en seksaj rilatoj

**de Michael Lennartz, Germana DR**

Laŭ medicina-psikologia aspekto ĉiu seksa rilato estas normala, kiun konsistigas la korpaj tuŝoj de du diversseksaj homoj, kiu estiĝas el respondeckonscia sinteno kaj kiu taŭgas por doni al ambaŭ gekunuloj la travivaĵon de korpa kontentiĝo (orgasmo) kaj feliĉo. En la rilatoj de du homoj ankaŭ validas la formulo pri la "morala normo": normala estas, kio konformas al la bezonoj kaj deziroj de ambaŭ, nocante nek la kunulon nek ties sentadon. Ĉi tiu vortumo fakte evitas la limigon "diversseksa". Samseksemo ja laŭ morala vidpunkto neniel estas negativa. Nur laŭ medicina vidpunkto oni devas konsideri, ke ĉi tiu formo de sekseco ne plenumas la historie socian taskon generadi la homaron. La koiton oni povas realigi en plej diversaj pozicioj, kiujn oni klasifas je observaj (vizaĝo al vizaĝo) kaj deturnaj pozicioj (latine: obversa/aversa). La hinda amlibro Kamasutram listigis jam antaŭ du mil jaroj



kompletan — kaj enuigan — serion da ili. Neniu el ili estas nenormala aŭ malakceptinda, se ĝi plezurigas.

Formo de amoro sen unuigo de la seksorganoj estas la karesado, kiu ampleksas ĉiujn erotikajn mantuŝojn kaj kiu povas stimuli orgasmon sen enigo de la peniso en la vaginon. Tiu amludo neniel malutilas kaj estas eĉ rekomendinda por junaj homoj, kiuj per ĝi paŝon post paŝo lernas teneron, korpan proksimiĝon kaj malfermon de la korpo por seksaj ekscitoj. Kiel iloj por reciproka tenerumado treege konvenas manoj kaj fingroj pro ilia altgrada sensivo. Multaj kredas, ke la seksorganoj estas tabuaj por la manoj de la kunulo. Kiel antaŭludo tia karesado eble estus permesebla.... Nu, ankaŭ orgasmigo kaj ejakuligo (eligo de spermoj) per fingrumado estas normalaj. La treege moveblaj fingroj kapablas adaptiĝi al specifaĵoj kaj reagoj aparte delikate.

Diskutebla — aŭ diskutata — estas ankaŭ buŝa seksumado. Iuj homoj rigardas tion kiel abomenindaĵon. Sciencistoj de la antaŭaj generacioj ĝin rigardis kiel plejan malnormalaĵon, plej fian deviaĉon. Sed jam la disvasteco inter spirite kaj korpe tute sanaj homoj devigis al ŝanĝita taksado. Minimume ĉiu dua plenkreskulo jam havis tiajn kontaktojn. Perbuŝa stimulado, antaŭ ĉio ĝis orgasmo, okazas pli ofte fare de la viro, ĉar eĉ inter senlime amorantaj virinoj ekzistas nur malmultaj, kiuj deziras kaj akceptas elspermigon tie.

Perbuŝa amorado povas esti esprimo de fortegaj amo kaj amoremo. Spertoj montras, ke homoj kun seksinhibicioj malakceptas tiajn kontaktojn; sed homoj de ambaŭ seksoj inklinas al tiuj teneroj, ju pli ili sentas sin erotike ligitaj kun la kunulo.

Do konklude ne ekzistas nenormalaĵoj en seksaj rilatoj. Tio ankaŭ koncernas la superseksemon, dumnoktan spontanean elspermigon (polucio) kaj masturbadon ĉi tie ne speciale traktitajn. Al tiu kategorio ne apartenas deviaĵoj kiel fetiĉismo, sadismo ktp., kiuj plu povas esti nomataj malnormalaĵoj. ▪

Verkita laŭ: Schnabl, Siegfried, *Mann und Frau intim.* 10/11-a eldono, Berlin: VEB Verlag Volk und Gesundheit 1978, 300 pĝ.

# Mi ne volas havi infanon

de Roza Valdepino, Nederlando

Ĉi tiu numero de *Kontakto* temas pri seksrilatoj. Tiujn oni povas rigardi de multaj flankoj; unu el ili estas ke amorado povas rezulti en gravediĝon. Ĉar tio plej ofte ne estas la celo de amorado, mi skribos ion pri la rimedoj preventi gravediĝon. Virino gravediĝas kiam la semo de viro kuniĝas kun la virina ovolo. Se vi do ne volas infanon, vi zorgu ke tio ne okazu. Por malhelpi la kuniĝon ekzistas multaj rimedoj. Jen priskribo de ili.

## La pilolo


**Uzo:** Ĉiutage aŭ ĉiutage 3 semajnojn el kvar.
**Materialo:** Virinaj kaj viraj hormonoj.
**Funkciado:** Ĝi preventas ke la monata ovolo liberiĝu kaj zorgas ke la utero ne plu pretu akcepti la ovolon.
**Sekureco:** 99,9%.
**Mankoj:** Kiam iuj virinoj komencas uzi la pilolon, ili spertas kapdolorojn, vomemon aŭ plipeziĝon. Kutime tiuj plendoj foriĝas post iom da tempo. Foje necesas ŝanĝi al alia speco de pilolo. Ekzistas virinoj kiuj ne povas uzi la pilolon, ĉar la korpo malbone reagas al la medikamento. Virinoj kiuj uzas la pilolon havas pli da ŝanco akiri trombozon. Virinoj kiuj uzas la pilolon kaj multe fumas, havas pli da ŝanco suferi korinfarkton. Regula kontrolo de kuracisto necesas.

Milionoj da virinoj tra la tuta mondo uzas la pilolon nuntempe, ĉar ĝi estas la plej facila kaj plej fidinda maniero por protekti sin kontraŭ nevolata gravediĝo. Nova fenomeno estas la "injekcipilolo". Ĝi funkcias pli-malpli kiel la pilolo sed anstataŭ gluti ĝin ĉiutage oni iras al kuracisto ĉiun 4an, 12an aŭ 26an semajnon (depende de la speco) por ricevi injekcion.

La avantaĝoj de ĉi tiuj hormonaj rimedoj estas, ke oni ne bezonas timi pri gravediĝo, nek zorgi pri kontraŭkoncipa rimedo kiam oni volas seksumi, kaj ke la menstruado okazas tre regule kaj ofte malpli dolore.

## La spiralo

**Uzo:** Ĝi estas metita en la uteron de virino ĉiun duan aŭ trian jaron.
**Materialo:** Malgranda, fleksebla plasta aĵo en diversaj formoj kaj mezuroj, foje kun kupra aldonaĵo.



**Funkciado:** La spiralo kaŭzas iriton de la utero tiel ke la utero ne pretas akcepti la ovolon. La ovolo pli rapide trapasas la ovodukton. Kupro paralizas la viran semon, tiel ke ĝi apenaŭ plu povas moviĝi.
**Sekureco:** 98%.
**Mankoj:** La menstruo dum la unuaj monatoj post la enmeto estas kutime pli forta; ankaŭ povas sentiĝi doloraj krampfoj en la ventro aŭ dorso. Foje la utero elĵetas la spiralon. Tial necesas kontroli pri tio dum la menstruado. Kontrolo ĉe kuracisto devas okazi ĉiun duonjaron. Se virino tamen volas infanon, ŝi petu la kuraciston forigi la spiralon (neniam mem faru). Eblas post nasko tuj denove enmeti spiralon.

## La pesario

**Uzo:** Virino devas meti la pesarion en la vaginon tiel ke ĝi kovru la uterelirejon. La pesario ĉiam devas esti ŝirmita ambaŭflanke per semmortiga pasto. Necesas enmeti la pesarion antaŭ ol seksumi kaj elpreni ĝin nur ses horojn poste.
**Materialo:** Ĝi estas molguma kupolo kun risorto aŭ spiralo en la rando.
**Funkciado:** Ĝi preventas ke la ovolo kaj la semo kuniĝu. La pasto mortigas la semon.
**Sekureco:** 90-98% depende ĉu oni uzas la ĝustan pesarion kaj paston, kaj ĉu oni ĝuste enmetas ĝin.
**Mankoj:** Foje la gumo iritas. Eblas en tiu kazo uzi plastan pesarion. Spontanee seksumi estos iom malfacile; necesas ĉiam pensi pri la pesario, pasto ktp. kaj kunporti ilin se oni tranoktos aliloke. Kuracista kontrolo necesas ĉiun duonjaron.

## La kondomo

Kondomo aspektas kiel fingro de guma ganto, sed ankaŭ eblas aĉeti ilin en diversaj koloroj aŭ kun reliefo.
**Uzo:** La kondomo devas esti ŝovita sur rigidan penison, sed la pinto de la kondomo devas resti libera. Kondomoj estas uzeblaj ĝis ili difektiĝas.
**Materialo:** Guma "fingro".
**Funkciado:** Ĝi malhelpas, ke la semo povu atingi la ovolon. Necesas samtempe uzi semmortigan paston aŭ pilolon. Kiam la ejakulo okazis, la viro devas retiri sin dum la peniso ankoraŭ estas rigida, ĉar alie la kondomo riskas forgliti.
**Sekureco:** Ĝis 95% kiam uzata kun semmortiga pasto aŭ pilolo. Konsiderinde malpli sen tiuj helpiloj.
**Mankoj:** Spontanee seksumi estas iom malfacile. Ĝi povas iriti la vaginon. Ĝi povas facile liki aŭ ŝiriĝi. Estas signifa ŝanco fariĝi graveda se oni uzas nur kondomon sen aldonaj rimedoj.

Ĉiam kontrolu antaŭ kaj post uzo de kondomo ĉu ĝi estas en bona stato. Tion kontrolu per enmatado de akvo. Se vi malkovros likon post la uzo, tuj iru al kuracisto kaj petu pri "Pane-pilolo" aŭ aliaj paŝoj. Kondomo estas, krom kontraŭkoncipa rimedo, certagrada gardilo kontraŭ seksmalsanoj.

## Semmortigaj rimedoj

Ĉe pesario kaj kondomo necesas uzi semmortigan paston, pilolon aŭ ŝaŭmon. Ili kontraŭstaras kaj mortigas la semon de la viro antaŭ ol ĝi povu atingi la ovolon. La paston oni metas sur la pesario aŭ kondomo. La pilolon kaj ŝaŭmon oni metas en la vaginon.
**Uzo:** Kiel eble plej malfrue antaŭ la sekskontakto.
**Materialo:** Ĥemiaĵoj.
**Sekureco:** Sen alia rimedo tre malalta.
**Mankoj:** Ĝi povas iriti la vaginon. Ĝi povas liki el la vagino. Ĝi povas odoraĉi. Ĝi ne taŭgas kiel kontraŭkoncipa rimedo sola. Ne eblas spontanee seksumi.

*La grado de sekureco de la menciitaj rimedoj dependas de ilia ĝusta uzado. Nun ni venas al rimedoj, kiuj estas tre riskaj:*

### Retiro *(interrompita koito)*

La viro retiras la penison ĝuste antaŭ ol li ejakulas, tiel ke semo ne povu eniri la vaginon. Tio ĉi estas tre riska maniero, ĉar povas veni antaŭfluidaĵo kiu enhavas semojn kaj ĉar la viro povas ne atenti kaj ne sufiĉe frue retiri. Krom ke ĝi estas riska maniero ĝi ankaŭ bezonas la daŭran atenton de la viro kaj spontanea koito ne eblas.

### Metodo de Ogino Knaus

En la periodo de 48 horoj antaŭ ĝis 24 horoj post la ovogenezo oni ne devas koiti. La prognozo de la ovogenezo estas ebla nur ĉe tre regula menstruado. Pere de kalendaro eblas kalkuli la probablan ovogenezon.

Proksimume 14 tagojn antaŭ la menstruo okazas la ovogenezo. Ne ĉiam estas precize 14 tagoj, sed neniam estas pli ol 16 aŭ malpli ol 12 tagoj. La ovogenezo okazas do 16-12 tagojn antaŭ la menstruo.Krome ni devas pensi pri la 48 horoj antaŭ kaj 24 horoj post la ovogenezo. Rezulte: ne seksumu de la 18a ĝis la 11a tagoj antaŭ la venonta menstruo. Sed la menstruo kutime ne venas ĉiun 28an tagon. Tial estas malfacile precize kalkuli la tempon de la ovogenezo.

**La metodo de Ogino Knaus helpe de la temperatur-metodo:** Ĉiumatene virino mezuras sian temperaturon. De la fino de la menstruo ĝis la ovogenezo la temperaturo estas pli malalta (ĉ. 1° C) ol post la ovogenezo. Kiam la temperaturo en la unua periodo malaltiĝas oni povas esti certa ke la ovogenezo okazas en tiu tago. Ĉi tiun metodon oni povas apliki helpe de kuracisto aŭ flegisto. Necesas ĉiutage zorge mezuri la temperaturon. Malsano, malvarmumo ktp. detruas la kalkulojn.

### Irigacio

Jen metodo laŭ kiu oni per akvo forigas la semojn el la vagino.

*Ni nun venas al metodoj kiuj povas esti aplikataj en kazo de paneo de la uzitaj kontraŭkoncipaj rimedoj aŭ forgeso de ili:*

### Pane-pilolo

Estas medikamenta rimedo kiun oni devas gluti dum la kvin tagoj post la sekskontakto sen efika kontraŭkoncipa metodo, komencante en 24 horoj post la kontakto. Ĝi konsistas el hormonoj centoble pli fortaj ol en normala pilolo. Tre ofte oni malsaniĝas pro ĝi kaj multe vomas.

### Aborto

Kiam virino konstatas ke ŝi ne menstruis en la kutima tempo ŝi povas proks. 14 tagojn post la atendita tago peti kuraciston esplori ĉu ŝi estas graveda. Se jes, eblas aborti laŭ la sekva metodo ĝis forpasas 12 semajnoj post la koncipo. En kliniko kuracisto elsuĉas per speciala aparato la enhavon de la utero. La tuta operacio daŭras ĉ. 20 minutojn. Post la operacio oni devas ripozi unu horon, kaj post tio oni povas hejmeniri. En Nederlando oni pagas minimume 5 MA-kotizojn por tia operacio. Se la gravedeco jam daŭris pli longe ol 12 semajnojn oni foje uzas medikamentojn por kaŭzi la aborton. Tio ĉi daŭras multe pli longe kaj doloras pli forte.


### Steriligo

Tio ĉi estas la plej efika kaj sekura maniero neniam plu produkti infanon.

**Steriligo de viro:** Kuracisto tondas kaj ligas la semtubojn. Kutime necesas nur loka anestezo. La daŭro de la operacio estas 15 minutoj. 4 ĝis 6 semajnojn post la operacio viro ne plu bezonas timi ke li gravedigos virinon. Steriligo laŭ tiu metodo ne kaŭzas fizikan impotenton.

**Steriligo de virino:** Kuracisto devas fermi la ovoduktojn tiel ke la ovolo ne plu povas atingi la uteron. La daŭro de la operacio estas ĉ. 4 horoj. Kutime necesas tute anestezi la virinon. Tuj post la operacio virino povas esti certa ke ŝi ne plu povas gravediĝi.

Infanoj kiuj naskiĝis "akcidente" ofte estas malpli bone traktitaj ol volataj infanoj. Tial, mi esperas por la infanoj, ke ĉi tiuj informoj povos malhelpi "akcidentajn" naskiĝojn. ▪




La represo de "La Reĝo de Umo" estas rajtigita de ELNA, la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko. Multobligita kolekto de 16 similaj bildstrioj estas aĉetebla ĉe ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono, je kosto de 75 usonaj cendoj aŭ 3 internaciaj respondkuponoj (inkl. sendokostojn).

VIRINA AGADO EN LA ESPERANTO-MOVADO:

# La komenca periodo



de Elsbeth Bormann,
FR Germanio

Kiam ronda cifero de jaroj memorigas pri datreveno de la "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj" tiam oni de multaj flankoj grandskale atentigas pri ili. Mi mem jam havis spertojn pri homaj rajtoj, sed nur je ilia 20-jara jubileo en la jaro 1968 klariĝis al mi, kio vere estas la "homaj rajtoj". Estante politike interesata, mi siatempe konstatis, ke nur malmultaj homoj scias klare pri tiu temo. Mi sentis la neceson pli vaste okupiĝi pri la "homaj rajtoj". Per legado de tiu konvencio kaj per kolekto de pluaj spertoj el la literaturo mia intereso kreskis pri la temo pli kaj pli. Por pludoni la akiritajn informojn mi ellaboris prelegon; estis mia intenco pere de prelegserio helpi, ke la scioj pliprofundiĝu ne nur ĉe mi.

Ĉiam mi strebis, ne pensi abstrakte aŭ teorie, sed konkrete, kaj praktike labori por bonaj celoj. Tial mi en mia traktado de homoj rajtoj elektis tri subbranĉojn, kiuj estas efektive ligitaj al mia propra vivo: la virina problemo (diskriminacio laŭ sekso), la lingvoproblemo (kiel esperantisto) kaj, ĉar mi iam loĝis ĉe la germandana landlimo, la demando pri naciaj minoritatoj.

Kiam mi diskonigis la homajn rajtojn mi estis ankaŭ politike aktiva. La kulmino en tio estis membreco en la parlamento de mia loĝurbo. Ankaŭ tie mi povis konstati, ke ekzistas diskriminacioj, kiel ili estas priskribitaj en la "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj". Ofte virinoj trovis lokon nur en tiuj komitatoj, kiuj prilaboris socialajn aŭ similajn aferojn. Urbokonstruado, trafikoproblemoj, la plejparto de la politikaj taskoj restas por la viroj. Sed ankaŭ ĉi tie iam okazos ŝanĝoj, espereble baldaŭ. Certe troviĝas knabinoj, kiuj volonte lernus metion, kiun ĝis nun kutime lernis knaboj, kaj certe estas virinoj, kiuj volonte kunparolus kaj ankaŭ povus grave kontribui en fakaj demandoj.

La instigo pli intense trakti la malhelpojn kontraŭ virinoj el la vasta gamo de diskriminacioj denove venis de la Unuiĝintaj Nacioj. Ili proklamis la jaron 1975 la "Internacia Jaro de la Virino". Plej ofte oni reagis skeptike, laŭ la moto "Por kio nun tio ?" Sed mi tre ĝojis, ĉar mi imagis, ke tio donos certan atenton pri la afero de la virinoj. Mi renkontis tujan pretecon ĉe la Estraro de UEA prilabori la virinan problemon ankaŭ inter la esperantistoj. Al tio apartenis fondo de komisiono, kiun gvidi la Estraro min petis, kaj enmeto de la temo "Jaro de la virino" en la programon de Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. Kun kelkaj kunlaborantoj mi komencis intensan korespondadon pri niaj laboroj kaj pri nia manifestacio dum la UK. Estis klare, ke partopreno en la de Unuiĝintaj Nacioj lanĉita jaro devas signifi interne plivastigi la kunlaboron de virinoj en niaj organizaĵoj kaj eksteren apliki Esperanton kiel interkomprenilon en la virina laboro kaj por la bono de la virinoj. En ambaŭ kampoj estis eble ion fari por la virinoj kaj kiel kromefiko ankaŭ Esperanto povis esti pli vaste diskonigata. Nia pozicio kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun suborganizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj, nome kun Unesko, plifortiĝis.

Elstaraĵo en la Esperanto-vivo ĉiam estas la Universala Kongreso de Esperanto kaj ankaŭ en la prilaboro de speciala tasko ĝi signifas la kulminon. Ni ĉiuj rigardis la kongreson en Kopenhago kun scivolo.

La sukceso pravigis nin. La programopunktoj de la 60a Universala Kongreso de Esperanto, kiuj rilatis al la temo "Virino", estis ĉiuj bone vizitataj kaj donis multajn novajn impulsojn. Ni kvar preparantoj de tiuj programopunktoj en Kopenhago estis tre fieraj, kiam multaj virinoj, sed ankaŭ multaj viroj, vizitis niajn aranĝojn. Tre pozitiva por nia ekstera laboro estis la kunestado kun la aktivuloj de la virinaj asocioj el la gastlando. Tiu aranĝo, en la venontaj jaroj daŭrigata kaj al kiu aldoniĝis pliaj kunvenoj en rilato al la temoj por virinoj interesaj, fariĝis pli signifaj en la lastaj jaroj. Per tiuj kunvenoj kaj el la spertoj el ili, ni povas informi pri Esperanto ankaŭ en multaj aliaj rondoj, kio ja estas tre dezirata. La informlaboro ricevas ĉefe per la ekstera efiko novan nuancon.

Pluraj el tiuj instigoj estis pliprofundigitaj dum multaj naciaj kongresoj, kaj en lokaj kaj en regionaj Esperanto-konferencoj. En kelkaj landaj asocioj de UEA oni multe laboris kaj ankoraŭ laboras en la privirina kampo; la temo ankaŭ eniris la fakajn asociojn. El bone informita fonto mi scias, ke en Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj nun komenciĝas laboro de virina grupo. La instigo venas el la laboro de la jaro 1975, de la unua komisiono por virina laboro por UEA. Estis tiam krom mi kiel komisiito la sinjorinoj Grattapaglia, Pallós kaj Isobe. Neniu el ili plue aktivas nun ankoraŭ en la komisiono.* Ni povis doni nian taskon al aliaj, post kiam ni montris la vastajn eblecojn.

Senco de la virina laboro estis ekde la komenco kuraĝigi virinojn, ke ili mem klopodu kunagi en gravaj taskoj de la ĝenerala Esperanto-laboro, kaj ke ili ne restu en iu virina geto. Ĉar mi nun estis elektita en la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio 1977 kiel prezidanto, mi retiriĝis el la internacia virina laboro. Por virino ekzistas la ebloj, ke ŝi respondece kunlaboru, loke, regione, eble nacie aŭ internacie. Nepre estas bona afero, se la postenoj estas okupitaj sen diskriminacioj, ĉu en la profesio aŭ kiel ĉi tie en elektita ofico. Per tio ni esperantistoj povas doni bonan ekzemplon.

En nia batalo kontraŭ la diskriminacio laŭ lingvo ni nun ankaŭ frontas alian diskriminacion, nome tiun laŭ la sekso. Se ni virinoj, survoje al la samrajteco de la seksoj, ekprenas la eblojn ofertitajn al ni, tiam ni povas plibonigi nian pozicion. La pordo por pli ampleksa kunlaboro de virinoj estas larĝe malfermita, ĉar la kuraĝigo de virinoj estas parto de la intencoj de la Estraro de UEA: ili trovu la vojon en gravajn funkciojn, kiel tio estas priskribita en la "taskaro prioritata" (Revuo „Esperanto", Majo 1978). Ankaŭ tio estas efiko de la menciita atento pri la afero de la virinoj, kiun vokis Unuiĝintaj Nacioj en 1975 kaj kiun ni transprenis kiel la unuaj. ■

* La nunaj membroj de la komisiono estas la sinjorinoj Brennan, Demmendaal kaj Szabó-Felső.



**S-ro Peter Kuenstler**

**Ĵus nomita Direktoro de la UN-Centro por Socia Evoluigo kaj Humanaj Aferoj en Vieno**

## UN KAJ LA JUNULARO: BELAJ REZOLUCIOJ, SED...

La junularo estas minoritato en Eŭropo. Sed en la cetero de la mondo, gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj konsistigas almenaŭ 65% de la loĝantaro. Ni tial frontas la neceson klopodi plibonigi niajn kontaktojn kun tiuj gejunuloj, kaj tio estas tre malfacila afero. Junularaj organizoj, ĉu esperantistaj, ĉu politikaj, religiaj, sportaj aŭ kiaj ajn, estas multe pli oftaj kaj multe pli fortaj en industriaj landoj ol en evolulandoj. Multaj registaroj funde suspektas junularajn kaj studentajn organizojn (eble kun bona kialo) kaj tial UN troviĝas en malfacila pozicio, pro la principo pri suvereneco de unuopaj suverenaj ŝtatoj. Nenia entrudiĝo en tiun suverenecon estas permesata. Tiel rezultiĝas la nuna situacio, ke preskaŭ ĉiujare, aŭ en la Ekonomia kaj Socia Konsilio, aŭ en la Ĝenerala Asembleo, la reprezentantoj de suverenaj ŝtatoj ellaboras, post tagoj kaj tagoj da diskutado, belegan rezolucion pri tio ke la junularo estas gravega kaj esperiga pri la estonteco, kaj tiel plu, sed ili certigas ke nenio estu farita pri tio.

Tial, kun ĉi tiu formala situacio, ni laboris por ke neformale kunvenu pluraj internaciaj junularaj organizoj por diskuti siajn problemojn kaj temojn inter si, kaj kun iuj el ni de la UN-sekretariato. Kaj mi ĝojas diri ke ĉi-jare TEJO membriĝis en tiu ĉi Ĝeneva Neformala Kunveno. Tiu ĉi kunveno de junularaj organizoj havas malfacilan taskon, ĉar — kiel mi jam menciis — la registaraj reprezentantoj ĉe UN ŝatas senti ke la kunveno okazas: plaĉas al ili ke iel ili kontaktiĝas kun junularaj organizoj; sed ili tute ne volas aktivi pri tio, kaj ili ne volas doni rektan subtenon al tiuj organizoj.

Estas klare tamen, ke se la klopodoj de UN limiĝos je diplomatoj kaj burokratoj kiuj kunvenas kaj diskutas, limiĝos ankaŭ la rezultoj. Krom se UN povas transdoni siajn idealojn kaj ideojn al la loĝantaro de la mondo, la ŝancoj eĉ de ĝia pluvivo ŝajnas esti tre malgrandaj. Tial estas urĝe grave ke estu daŭra procedo de edukado (laŭ la pli larĝa signifo de tiu vorto) por paco kaj reciprokaj respekto kaj kompreno inter gejunuloj. Estas precipe ĉi-rilate, ke mi vidas la altan valoron kaj signifon de organizoj kiel la via, por ke homoj komprenu unu la alian, ne nur por aprezi unu la alian kiel homojn, sed ankaŭ por kompreni gravajn internaciajn problemojn kaj tiel povi premi je la farantoj de decidoj. Ankaŭ tial almenaŭ iuj el ni ene de UN klopodas konstrui niajn rilatojn kun gejunuloj kaj junularaj organizoj.

# Interŝtataj unuiĝoj – kiucele?

# El nia seminario

**Citaĵoj el la prelegoj de la KER-seminario okazigita de la 20a ĝis la 27a de julio en Nederlando, paralele kun nia junulara kongreso**



**D-ro Humphrey Tonkin**

**Vicprezidanto de la Centro pri Tutmonda Interdependo en Philadelphia**

## NEFORMALAJ KOMUNIK-RETOJ FARIĜAS ORGANIZOJ: DISKRIMINACIO KUNVETURAS...

Mia centra tezo estas, ke internaciaj organizoj ekestas pro la iama ekzisto de neformalaj komunikaj retoj. Sekvas el tio, ke la formo de la reto parte difinas la formon de la organizo ĉar estas la anoj de la reto kiuj kreas la organizon. Organizoj havas realan juran ekziston, ili havas statuton kiu estas akceptita de koncernaj kompetentaj ŝtataj instancoj. Pro tio oni povas plendi ĉe organizaj organoj, se ili malobservas sian statuton. Ekzemple, oni povas postuli de UN ke ĝi forigu lingvan diskriminacion, ĉar ĝia statuto, nome la Ĉarto, enhavas paragrafon kiu postulas ke homoj ne estu diskriminaciataj pro lingvo. Kontraŭe, oni ne povas plendi ĉe individuo, ke ties neformala internacia komunika reto praktikas lingvan diskriminacion, ĉar tiel ne funkcias komunikaj retoj: ili havas kiel bazan kriterion samecon de lingvo, memevidente, en tiu senco ke ĉiuj anoj de iu konkreta reto devas akcepti la lingvon de tiu reto kiel ilon de interna interkompreniĝo antaŭ ol eniri la reton. Ĉar tio ne estas jure reguligita per statuto, sed nur neformala praktiko, oni ne povas de ekstere interplektiĝi en ilian funkciadon. Kaj ĝuste tie ĉi kuŝas la kerno de la afero: internaciaj organizoj estas produktoj de la antaŭjuĝoj, de simplaj diskriminaciaj faktoj de tiuj neformalaj komunikaj retoj kiuj antaŭiris ilin, tiel ke UN estas granda bulo da neformalaj kontaktoj kie diskriminacioj okazas ĉiutage.

La sola maniero trapenetri tiun problemon estas la morala premo. Laŭdire, en la reala politika mondo moralo havas nenian valoron, sed la morala premo ja havas politikan efikon; kaj la fakto estas ke en la lastaj jaroj tiu morala premo fariĝis ĉiam pli kaj pli forta politika instrumento. Montriĝas ke por konvinki internacian organizon pri io, necesas utiligi la moralan premon por atingi tiun difinitan rezulton.

---

**S-ro John Catling**

**Ĉefadministranto de la Personara Sekcio de la Ekonomia kaj Socia Komitato de Eŭropa Komunumaro en Bruselo**

## EKONOMIA UNUECO EN LA EK: ARBITRAJ PROCENTAĴOJ DANĜERAS...

Financaj malhelpiloj ankoraŭ blokas la interŝanĝon de varoj: nerektaj impostoj. Ĉiu ŝtato-membro havas unu bazan sistemon de impostoj je aldonita valoro. Ekzistas diferencoj inter la alteco de tiuj impostoj. Ekzemple, impostoj por aĉetado de aŭtomobiloj varias de 11% en FR Germanio ĝis pli ol 100% en Danlando. Tio estas grava malhelpilo al la interŝanĝo de varoj. Sed ne estas facile,

daŭrigo sur p. 18 →

ke ĉiuj akceptu ekde morgaŭ 15% tial ke tio estas bona mezo. Ni ne forgesu ke dank' al tiuj impostoj kaj dank' al certaj monopoloj kaj helpiloj en la landoj mem, ekzistas industrioj kaj, ke de tiuj industrioj dependas la laboro kaj vivnivelo de multaj enloĝantoj de tiuj landoj. Oni ne povas simple forigi kaj unuigi senkonsidere, ĉar ankaŭ tio alportas novajn problemojn: malegalecon, senlaborecon, inflacion ktp.

---

**S-ro Richard Corbett**

**Membro de la Prezidantaro de Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizoj (ECBIYO) en Bruselo**

## DEMOKRATIGO DE LA EK: CENTRIGO FOJE, SED MALCENTRIGO PLI...

La kreo de unu sola merkato en la EK necesigas grandan kaj sufiĉe rapidan restrukturiĝon de industrio kaj laborsistemoj. Ankaŭ, pro la kreo de unu eŭropa merkato, sen la kreo de efikaj rimedoj regi ĝin, oni malfermis la pordon al la transnaciaj entreprenoj. Krome, kreiĝis grandaj regionaj neegalecoj. La diferenco inter la vivniveloj de la plej riĉaj partoj de la komunumo, kiel Hamburgo, kaj la plej malriĉaj, kiel suda Sicilio, kreskis: Hamburgo havas vivnivelon sesoble pli altan ol tiu de Sicilio. Ĉi tiuj diferencoj estis kaj estas tre grandaj.

La solvo estas la demokratigo de la Eŭropa Komunumaro. Tio estas, la kreo de politika integriĝo kiu povos ekregi la ekonomian integriĝon kiu jam okazis, kaj ĝustigi la negativajn efikojn de tiu ĉi integriĝo. Certe tiu ĉi politika integriĝo devus esti demokrate kaj response regata pere de la Eŭropa Parlamento, pli bone ol per la komplika reto de ŝtataj ministerioj kaj teknokratoj kaj burokratoj kiuj aktuale zorgas la decidofarajn procezojn en la EK.

Antaŭ ol aspekti kiel iu kiu volas krei tre centrigitan eŭropan ŝtategon, mi ĝustigu tiun opinion. Ŝajnas, ke unu el la problemoj kiujn ni frontas hodiaŭ en nia socio en okcidenta Eŭropo estas tio, ke ni havas aron da tre centrigitaj ŝtatoj kaj ke ĉiuj gravaj decidoj okazas je tiu ĉi nivelo. Same kiel mi jam montris ke iuj problemoj povas esti traktataj nur je pli alta, larĝa nivelo, restas pluraj problemoj kiuj devus traktiĝi je malpli alta nivelo, en la regionoj kaj lokaj komunumoj. Multe pli ol centrigon, ni bezonas malcentrigon. Nur tiuj problemoj kiuj ne povas esti traktataj malpli altnivele traktiĝu je la eŭropa nivelo.

Mi revenas al la temo kiun vi elektis por la seminario: "Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?". Mia respondo estas: por unuigi naciojn, venki artefaritajn naciismajn barilojn, lukti por paco kaj trakti problemojn kiuj pli kaj pli fariĝas internaciaj problemoj. Sed ne por krei iajn merkatojn por ies ekonomiaj interesoj, krei grupiĝojn pro politikaj aŭ strategiaj interesoj, aŭ alimaniere dividi la internacian komunumon. ▪

# Interŝtataj unuiĝoj – kiucele?

**Citaĵoj el la raportoj de la studgrupoj de la KER-seminario**

### Antikva Grekio: Sperto pri unuiĝo (gvidis Savas Tsiturides)

La unuaj klopodoj por efektiva unuiĝo datiĝas en la 5a jarcento a.K., kun la apero de Persoj en la helena historia tereno. La neceso pri konservado de la libereco de la propra lando kaj de la aŭtonomeco de la helenaj kolonioj en malgranda Azio rezultigis iniciatojn pri unuiĝo.

Ni komparis la antikvajn grekajn unuiĝojn kun la nuntempaj, emfazante tamen la diferencojn; nome, ke la loĝantoj de Helenio apartenis al la sama nacio, kontraŭe al tio kio okazas hodiaŭ. Ni konstatis, ke unu el la ĉefaj kialoj por la neefiko de helenaj unuiĝoj estas ke principoj kiel egaleco kaj samrajteco de ĉiuj membroj de la unuiĝo ne estis ĉiam respektataj.

### Socialismaj ekonomiaj organizoj (gvidis Michael Lennartz)

La gvidanto faris enkondukan prelegon pri la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo, la ekonomia organizo de socialismaj landoj. Dum la diskuto oni parolis pri diversaj problemoj de praktika realigo de ekonomia kunlaboro, emfazis la nure ekonomian karakteron de KREH, kiu neniel tuŝas la politikan suverenecon de la ŝtatoj-membroj, kaj diskutis pri persona libereco kaj opiniesprim-eblecoj en kelkaj socialismaj landoj.

### Medio-protektado trans limoj (gvidis Bert de Wit)

En interŝtataj unuiĝoj kiel EK kaj KREH la favoro al atomenergio restas klara. Ofte pri tio kulpas la interrilato inter novaj atomcentraloj kaj novaj industrioj, kiuj estas jam planitaj. Grandaj investoj estas faritaj pri atomenergio kaj tiun monon oni iel volas reakiri. Interŝtataj unuiĝoj malofte estas taŭgaj instrumentoj por la mediprotekta strebado, kvankam la primediaj problemoj estas laŭ sia naturo destinitaj al internacia solvado. La aktivigo de konsciaj homoj en diversaj landoj, naci- kaj internaci-skale, povas zorgi por la necesa politika premo. Ekologia Rondo Esperantista ekaktivas pri mediaj problemoj kaj sin montras al ne-esperantistaj primediaj organizoj.

### Kvin Fratinoj de la Nordo (gvidis Tuomo Grundström)

La unua konkludo de la studgrupo rilatis la diversecon de la koncepto 'interŝtata unuiĝo' kiu eĉ nur en sia eŭropa kunteksto ampleksas kaj la intiman ekonomian kunlaboron de EK kaj KREH kaj la multe pli lozan komunan agadon inter la Nordaj Landoj. Se la celo de EK estas ekonomia integriĝo, la Nordaj Landoj havas malpli ambician celon: harmonia kunordigo de agadoj sur plej diversaj kampoj ekster la ekonomia sfero sen malgrandigi la sendependecon de ĉiu partoprenanto. Ĉu eblas decidi, kiu celo estas pli dezirinda por interŝtataj unuiĝoj ĝenerale? Oni opiniis, ke ne. La nordlandanoj en la grupo ne vidis praktikan eblecon aŭ dezirindecon transformi la Nordon en ekonomian blokon.

### Kontraŭ interŝtataj unuiĝoj (gvidis Oscar Puig)

La studgrupo diskutis la temon surbaze de dokumento alportita de la organizantoj. Oni konkludis, ke ekzistas en Okcidenta Eŭropo pluraj nacioj, kiuj estas senigitaj de siaj propraj ŝtatoj kaj submetitaj al fremda povo. La nunaj interŝtataj unuiĝoj favoras la pluekziston de tiu situacio kaj celas la laŭgradan unuecigon de la popoloj, nuligante la naciajn kulturajn kaj diferencigajn trajtojn de tiuj popoloj. Oni ne povas akcepti interŝtatajn unuiĝojn bazitajn sur ekspluatado de nacioj far nacioŝtatoj. Celindas internaciaj unuiĝoj kiuj favoru egalrajte ĉiun popolon surbaze de la rekono de la plena supereneco de siaj nacioj. ▪

NUMERO SEP

# tentaklo

REAGOJ AL LA ARTIKOL-SERIO DE ANNA BRENNAN

**Reago al "Kondiĉado por timo" (Kto 60, p.14) de Probal Daŝgupto:**

Parolante pri viro kaj timo, Brennan diras, 'Fakte la nura devigo kaŝi timon helpas ilin iom superregi ĝin.' Konfirme pri tio mi volas mencii la sperton de gepatroj en tiuj partoj de Indonezio, en kiuj oni instruas al infanoj ne montri koleron. Laŭ geamikoj, kiuj studas la kulturon kaj longe loĝis en Indonezio, tiu instruado ebligas al la infanoj lerni ne nur sinbridon pri la esprimado de kolero sed eĉ sinbridon pri kolerado mem. Necesas distingi inter kolero kaj indigno: indignon oni sentas kontraŭ homo, kiu faris malutilon al oni; koleron oni sentas pri propraj aŭ/kaj aliulaj eraroj kaj pri aferoj kiuj rezultis el nenies kulpo. Se mi bone komprenis, tiuj indonezianoj ne instruas eviti indigniĝon.

**Reago al "Unuflanka invito" (Kto 61, p.12) de Herman Deceuninck:**

La sekseco ne plu estas aktuala problemo. Pli grava problemo estas la ĉiam kreskanta soleco de la homoj kaj la malfacilaĵoj por glate kontakti aliajn homojn. Okazas, ke homoj dum jaroj rigardas unu la alian sen alparoli unu la alian. Precipe en urbegoj, plenaj je anonimeco, la bezono je homa kontakto estas plej sentata.

Ĉiu birdo kantas tiel, kiel li estas. Tial okazas, ke iuj knaboj preferas tuj stiri la konversacion al seksaj temoj, dum aliaj preskaŭ flankafere sed kalkulinte enpenetras en la privatsferon de la ino, sen seksmalsataj okuloj kaj sen ajna aludo al la celo. Ĉu ne ĝuste tia silenta interkonsento ja estas akceptata de la ino?

Estus interese foje scii de la legantoj de *Kontakto* kian partneron ili plej ŝatas kaj kiujn trajtojn de karaktero oni plej aprezas. Mi kredas, ke la sinretirema rolo, enradikiĝinta pro edukado, klarigas kial ne pli da inoj aktive prenas la iniciaton en seksaj rilatoj kaj ofte lasas la aferon al "etaj signaloj". Mi scias, tamen, ke la seksoj nepre havas ion komunan: la deziron je interkonatiĝo kaj la esperon al feliĉo kaj sincera amikeco.

**Reago al "Unuflanka invito" (Kto 61, p.12) de Probal Daŝgupto:**

Brennan miras pri la komune akceptata ideo 'ke la virino **donas** ion, kiam ŝi fikas'. Oni povas miri ankaŭ, ke, almenaŭ en la nordhindaj lingvoj, la vulgara vortprovizo pri la seksumo ne havas vorton por la klitoro, do ne agnoskas la ekziston de virina seksa plezuro.

Ĉu mi eraras, opiniante, ke ankaŭ en la okcidentaj lingvoj la vulgara vortprovizo ne distingas la klitoron disde la piĉo? En kulturoj kiuj supozas, ke la virino senplezure permesas al la viro ekhavi per ŝi sian plezuron, kompreneble tiu supozo igas onin kredi, 'ke la virino **donas** ion, kiam ŝi fikas.' Antaŭ nur iom da jaroj iuj anglinoj jene konsilis al siaj filinoj, kion ili faru dum seksumo: "Fermu la okulojn, kara, kaj pensu pri Anglio". Same nesurprize, en kulturoj kiuj havas vortprovizon pri midzado, oni diras pri la midzanta persono, ke li aŭ ŝi 'donas midzon', supozeble ĉar la alia parano kutime atingas en tiu tempo plian proksimecon al orgasmo, ol la parano midzanta.

Certe Esperanto ne havas vulgaran vorton por la klitoro. Anstataŭ kulpigi Petron Peneter pri tiu preterlaso, ni proponu neologismon, tiel ke Esperanto fariĝu eble la unua civilizita lingvo, kiu ĉesos nei la ekziston de virinaj orgasmoj. Al mia senfantazia cerbo proponas sin por la posteno de vulgara vorto por la klitoro '**tliko**'. Mi povas veti, ke aliaj kandidatoj estos fonetlike pli tlaŭgaj.



**Demandoj pri la nuna numero:**

1. Kio estas normala kaj nenormala seksa konduto?
2. Kio estas la rolo de la familio en via socio?
3. La familio estas unu el la bazaj institucioj de socio. Kiuj estas aliaj? Kion devus fari ĉiu?
4. Ĉu familioj funkcias adekvate en la moderna mondo?
5. Ĉu ni devas forigi seksajn stereotipojn? Kiel ni faru tion? Kia socio rezultos el tiu forigo?
6. Kio estas la rilato inter stereotipoj kaj diskriminacio?
7. Ĉu nasklimaj informoj kaj rimedoj devus esti universale akireblaj?
8. Kial malmulte da virinoj okupas gravajn funkciojn en la Esperanto-movado?

**Reagu senlimdate al S. MacGill, Bethlehemstraat 23e, 3061 GA Rotterdam, Nederlando. Ne sendu registritajn leterojn al tiu adreso.**


## Nova glumarko de TEJO: **Eĉ ŝtelistojn ĝi varbas!**

*Malluma semajnfina nokto. Junaj kanajloj grimpas en la korton de la Centra Oficejo. Sukcesas eniri kabanon. De tie trabatas muron por eniri suban etaĝon. Ignorante plurajn valoraĵojn, ili kontentiĝas elverŝi niajn stoketojn de kafopulvoro, teo kaj sukero. Poste, en la libroservon. Iom da ludado per la diversaj stampiloj. Ignoras mil-libran muron de* Esperanto en perspektivo. *Ignoras milojn da aliaj libroj, diskoj, kasetoj. Prenas unu/du insignojn, iom da gluetikedoj. Malkovras la TEJO-glumarkon!* **Atento tuj kaptita!!!** *3200 glumarkoj forŝtelitaj — ĉ. 15% de la tuta eldonkvanto.*

*Tio ne signalas financan katastrofon por TEJO. Por tiuj kazoj la libroservo havas asekuron. Ĝi eble eĉ ne signalas varban katastrofon — kondiĉe ke la ŝtelintoj glue distribuu la markon tra la urbo. Ili certe tion farus en ne-esperantista medio, kie neniam varbus TEJO-anoj. Modela ekstera varbado! Kuraĝa trarompo de la verda kurteno!!*

*Nur unu timon ni havas. Se la ŝtelintoj gluos ĝin ĉe la scenoj de siaj estontaj krimetoj, ĉu la polico ne venos enkarcerigi la TEJO-estraron? La organizo bezonos grandan financan forton por kontraŭstari la efikojn de la unua ses-monat-daŭra estrarkunsido. Kontribuu al tiu financa forto aĉetante la restantajn glumarkojn amase!*

**Dukolora (ruĝa kaj verda) kun blankaj literoj, diametro 37mm, memglua. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Minimuma mendokvanto estas cent glumarkoj, kio kostas 6,00 gld. Sed 7,08 gld. por Nederlandanoj. Sesona rabato por 300 aŭ pli. Estas konsilinde samtempe mendi aliajn varojn, pro la sendokostoj (10%, kun minimumo de 3,00 gld.) kaj la minimuma mendosumo (15,00 gld.).**

esperanto tejo junularo

Rauma estas apudmara urbeto kun ĉirkaŭ 30 000 loĝantoj, 100km norde de Turku. Meze de la urbo troviĝas ankoraŭ malnova kvartalo kun lignaj domoj. La urbo havas tradicion de puntofarado, kiu kulminas ĉiujare en puntosemajno. Ĝuste tiu festa semajno okazos samtempe kun nia 36a Internacia Junulara Kongreso. Interalie pro tio, la kongresa temo estos "Popola tradicio en la nuntempa mondo". Do, socipolitiko en 1979; kulturo en 1980.

Pro tiu kultura temo, LKK donas apartan atenton al la artaj kaj literaturaj aranĝoj. Ĝi akiris la kunlaboron de la urba turisma oficejo kaj la organizantoj de la punta festo-semajno. Ĉiuj el la kutimaj "faru-ion"-laborgrupoj (popoldancado, kantado, manlaboroj) ligiĝos tre rekte al la temo. La "diskutu-ion"-laborgrupoj povos debati la rolon (kaj eble eĉ la neceson) de popola tradicio en moderna komerc-industria mondo. Ĉu tradicio kaj moderneco nepre devas konflikti? Se jes, ĉu la tradicio estas malvenkanta? Ktp. Ktp.

La kotizoj en la suba tabelo inkluzivas loĝigon, manĝojn, ekskurson kaj programon por la tuta semajno. Membroj de TEJO ĝuas rabaton de 20 gld. La kotizoj estas donitaj en guldenoj. Por pagi en finnaj markoj, kalkulu, ke unu guldeno egalas du finnajn markojn. Detaloj pri pagmaniero kaj aliaj sciendaj aferoj troviĝas sur la aliĝilo.

| Aĝ-kategorioj: | Ĝis 791231: | Ĝis 800331: | Ĝis 800630: | Ekde 800701: |
|---|---|---|---|---|
| - 20 | 190 | 205 | 220 | 240 |
| 21 - 25 | 205 | 220 | 235 | 255 |
| 26 - 32 | 220 | 235 | 250 | 270 |
| 33 - | 245 | 260 | 275 | 295 |

Kiel kongresejo funkcios la modernaj kontruaĵoj de la urbaj civitana instituto kaj lernejoj. Por informiloj, aliĝiloj kaj aliaj demandoj, skribu al la oficiala adreso de la Kongreso:

**36a IJK, Anundilankatu 3, SF-26100 Rauma 10, Finnlando.**

# 36a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO 25 JULIO – 1 AŬGUSTO 1980



## RAUMA FINNLANDO

